

1981 novembro

74-a jaro

n-ro 911 (11)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Facila numero por komencantoj

Vi trovos

tute alian revuon ene de la kovrilaj paĝoj de ĉi tiu periodaĵo, kiun vi abonas. Por ne tute ŝoki vin, ni konservis la kutiman litertipon kaj kelkajn aliajn grafikajn karakterizaĵojn de la revuo. Ĉio cetera estas nova, alia. La temoj de la numero estas ĝis tiu grado aliaj, ke ili preskaŭ tute ne traktas Esperanton. Anstataŭ informiĝi pri la Esperanto-movado, jen vi havas ŝancon lerni ion pri kimono kaj aliaj japanaj, pri hindoj, telefono por neaŭdantoj, Unuiĝintaj Nacioj, israela junulo en brita lernejo ktp. Bonvolu ankaŭ memori, ke la nomo de la redaktoro en la apuda kolumno ĉi-foje signifas nenion, ĉar ĉio kion li faris por la numero estis livero de kelkaj grafikaj konsiloj. Fakte, li eĉ fuĝis el la oficejo dum semajno kaj ĝuis la restaĵojn de la nordhemisfera somero ie en la sudo de Hispanio. La redaktoro de ĉi tiu speciala revunumero estas s-ino ANNA BRENNAN, kiu ĝis nun redaktis la Jarlibron de UEA kaj baldaŭ forlasos tiun postenon, por, interalie, eventuale okupiĝi pri redaktado de regule aperanta revuo por komencantoj. La celo de ĉi tiuj linioj devus esti ankaŭ kvietigi vin abonanton, ke la decembra revunumero denove revenos al la kutimaj enhavo kaj aspekto, pro kiuj vi — supozeble — regule abonas ĝuste ĉi tiun, kaj ne iun alian movadan revuon. Ni ne volas per tio nei la gravecon de la komencantoj. Jes, ili estas gravaj. Tre. Tamen, ni ĉiam konsideris la Movadon iaspeca armeo de batalantoj por la Internacia Lingvo. Nia revuo tradicie celis kaj celos liveri al tiu armeo la ĉefajn armilojn, t.e. ebligi al ili plenan informitecon pri ĉio koncernanta la Internacian Lingvon kaj la tutmondan Esperanto-movadon. Prenu do ĉi tiun numeron kiel eksperimenton por kiu nia revuo servis nur kiel prunteprenita retorto, kiun la eksperimento ne eksplodigas. Ĉu ni petu ankaŭ vian pardonon, ke ni lasas vin de oktobro ĝis decembro atendi movadajn novaĵojn? Ni do provos prizorgi aparte interesan numeron por kompletigi ĉi tiun jarkolekton. Se ĉi tiu numero montriĝos esti subnivela rilate vian nekomencantan dignon, vi ĉiam povas mendi iun libron aŭ aŭskulti Esperantajn radio-elsendojn. Cetere, provu foje agi anstataŭ legi!

Enhavo

- 181 Facilaj revuoj ne ĉiam estas facilaj (Anna Brennan)
- 182 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 184 Esperanta gazetaro: Gazetoj por ĉiu gusto (Karl Pov)
- 186 Informplena semajnfino (S. MacGill); 120 facilaj paŝoj
- 187 Ses centroj de la Esperanta kulturo (pri Esperanto-bibliotekoj)
- 188 Artisto, kiu tranĉis siajn flugilojn (Marjorie Boulton)
- 189 Joe kaj la Papo (Ralph Harry)
- 190 Kimono estas praktika artverko (Krizantemo)
- 191 Longa decidado, rapida farado (Shuichi Yamakawa)
- 192 Kio ligas hindon kaj aŭstralianon? (Probal Daŝgupto)
- 193 Miriga sperto ĉe nova lernejo (Jonathan Löwenstein)
- 194 Esperanto-instruado: Serĉo de novaj vojoj (E. Symoens)
- 195 Rakonto: Morto sub la arboj (Bertram Potts)
- 196 La telefono post cent jaroj (Wouter F. Pilger)
- 197 Kiel neaŭdanto povas uzi telefonon (Wouter F. Pilger)
- 198 Asocio por inteligentuloj (Audrey C.E. Childs-Mee); Enigmo
- 199 Bildstria rakonto el Ĉinio; Anoncetoj
- 200 Esperanto en radio (Plena tabelo)

La kovrilo

La kovrila bildo, kiun produktis Stefan MacGill, vere montras komencantojn. Ie en Nederlando. En provleciono de Esperanto. Se iu el ili efektive lernos la lingvon, devus ne manki miro, ke jen la ĉefa movada periodaĵo bilde notis lian/ŝian unuan paŝon survoje al la konkero de la Internacia Lingvo. Verdire, ni ne devis produkti specialan foton de komencantoj. Ni estus povintaj preni iun grupan kongresan foton, ĉar komencantoj svarmas ankaŭ tie.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenwg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto). Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). Legata en 102 landoj. Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo varias laŭlande. Petu de via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero 4,— gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1000, 1/2 p. 530, 1/4 p. 290, 1/8 p. 170, 1/16 p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri financo kaj administrado: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Vicprezidanto kaj estrarano pri planado kaj landa agado: d-ro Renato Corsetti, Via Strabone 1, I-00176 Roma, Italio; tel. (06) 29 26 07.

Vicprezidanto kaj estrarano pri kulturo kaj edukado: s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavik, Islando; tel. (91) 3 73 01.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23-274.

Estrarano pri informado kaj delegita reto: s-ino Ursula Grattapaglia, C.P. 04-0097, BR-70000 Brasília (DF), Brazilo; tel. (061) 226-8101.

Estrarano pri kongresoj kaj virina agado: s-ino Eliza Kehlet, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio; tel. (031) 51 46 36.

Estrarano pri faka agado: s-ro Petăr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario.

Estrarano pri esploroj kaj kunordigo de eksteraj rilatoj: prof. Humphrey Tonkin, Stouffer College House, 3700 Spruce Street, Philadelphia, PA 19104, Usono; tel. (215) 387-8288.

Facilaj revuoj ne ĉiam estas facilaj

Facilaj revuoj ne estas nova afero por mi. Mi vidis plurajn. Ne kiel redaktisto, nek kiel instruisto. Mi vidis ilin kiel vera uzanto, kiel komencanto. Kaj ĉiuj tiuj facilaj revuoj — kiuj ne estis en Esperanto, cetere — donis al mi unu grandan malfacilaĵon. Mi ne povis kompreni ilin. Oni nomis ilin “facilaj”. . . sed ili en-havis tro da novaj vortoj. Kiel mi povis kompreni vortojn, kiujn mi ankoraŭ ne lernis?

ESPEREBLE, vi ne havos similan malfacilaĵon dum vi legas ĉi tiun facilan revuon. Kial? Ĉar ni provas uzi nur vortojn, kiujn vi jam lernis. Kiel tio eblas? Ni kunmetis liston de 1000 vorto-partoj (vorto-parto estas iu ajn parto de vorto, kiu portas signifon, do interalie ĝi povas esti finaĵo aŭ simile). La pli-multo de artikoloj en ĉi tiu revuo estas konstruita nur per eroj el tiu listo. Se necesas uzi vorton, kiu ne estas en la listo, oni aldonas klarigon post la vorto aŭ en la fino de la paĝo. Kiel ni kunmetis nian liston de mil eroj? Parte ni uzis jam ekzistantan liston, kiu nomiĝas *Baza radikaro oficiala*. Tiu listo donas la plej ofte uzatajn vorto-partojn. Ni ankaŭ rigardis kelkajn lerno-librojn. Ni prenis nur vortojn el la unuaj dek lecionoj. La pli-multo de vortoj en nia listo troviĝas kaj en la *Baza radikaro oficiala* kaj en tiuj lerno-libroj. Sed ni bezonis kelkajn aliajn vortojn. Oni ne povas redakti



Ne-eŭropanoj en Universala Kongreso: ĉu ili spertas malfacilaĵojn kiam ili unua-foje uzas Esperanton inter-nacie?

Esperanto-revuon sen la vortoj **asocio**, **kongreso**, **klubo**, **artikolo**, **literaturo**, **poemo** ktp. Do ni devis aldoni ilin.

Por la plej facilaj artikoloj, ni ne uzis ĉiujn vortojn en nia listo. Ni uzis nur 500. Vi povas rekoni tiujn artikolojn (aŭ partojn de artikoloj), ĉar ni presis ilin pli grande. Por fakaj artikoloj, ni trovis ke nia listo ne sufiĉas. Oni bezonas multajn specialajn vortojn krom tiuj en la listo. Do, tiuj artikoloj estas plej malfacilaj. Ni presis ilin per pli malgrandaj literoj.

Kompreneble, ni ne povas esti certaj, ke vi ĉiuj konas ĉiun vorton en nia listo. Vi loĝas en malsamaj landoj, parolas malsimilajn lingvojn, uzas diversajn lerno-librojn. Eble via lerno-libro prezentas vorton en la dua leciono, kiu aperas nur en la du-deka leciono ĉe alia kurso. Pro tio povus rezulti, ke en ĉi tiu revuo vi renkontas vortojn, kiujn vi ne konas. Aŭ ke ni zorge klarigas ion, kion vi tamen jam lernis. Se la facila revuo aperos regule, ni provos solvi tiun problemon, ĉar tiam eblos eldoni la liston de uzataj vortoj.

Ĉi tiu estas prov-numero. Tio signifas, ke ni produktas ĝin por eltrovi, ĉu ekzistas intereso pri facila revuo. Se jes, pri kia? Ĉu kiel ĉi tiu? Aŭ ĉu vi trovas ĉi tiun tro facila aŭ tro malfacila? Kiel ofte ĝi aperu? Ĉu vi volas, ke maldika revuo aperu ofte aŭ ke pli granda revuo aperu malofte? Ni ne faros finan decidon pri aperigado de facila revuo ĝis ni ekscios, kion vi opinias. En ĉi tiu revuo vi trovas poŝt-karton kun kelkaj demandoj. Bonvolu plen-skribi ĝin kaj resendi ĝin al ni.

Ni atendas vian reagon!

Anna Brennan

Kiu parto de ĉi tiu revuo estas por vi?

Ni presis la plej facilajn partojn de ĉi tiu revuo tre grande. Por legi ilin vi devas koni nur 500 vortojn. Kelkaj artikoloj komenciĝas per pli facila parto.

Ni presis aliajn partojn de la revuo malpli grande. Por legi ilin, vi devas koni 1000 vortojn.

Ni presis la plej malfacilajn artikolojn tre malgrande. Tiuj artikoloj uzas pli da vortoj. Verŝajne vi devos legi ilin kun vortaro.

Mallongigoj

bv. = bon-volu
d-ro = doktoro
ekz. = ekzemple
elp. = elparolo
k.a. = kaj aliaj
k.s. = kaj simile

ktp. = kaj tiel plu
s-ino = sinjorino
s-ro = sinjoro
t.e. = tio estas
UEA = Universala
Esperanto-Asocio

- Malto: 48 esperantistoj el 8 landoj parto-prenis Internacian Turisman Semajnon en Malto de la 1-a ĝis la 7a de septembro. Oni organizis la semajnon por festi la 20an jubileon de Esperanto-Societo (Malto). En oktobro komenciĝis tri Esperanto-kursoj en Malto, kun entute 34 lernantoj.

Loke



Jugoslavio

- Ĉiu-jara tri-landa renkontiĝo de esperantistoj el Aŭstrujo, Italujo kaj Jugoslavio okazis ankaŭ ĉi-jare, en Rijeka. 150 esperantistoj parto-prenis la 13an Tri-landan Konferencon en la 25a-27a de septembro. Ili ĉeestis plurajn prezentojn pri la eblecoj de turismo en la regiono de Alpoj kaj Adriatiko. La venont-jara kunveno okazos en Aŭstrujo en alpa regiono, proksime al la limo inter la tri landoj.

Brazilo

- 19 geinstruistoj gvidas Esperanto-kursojn por 303 gelernantoj en la brazila urbo Salvadoro. Kiel en la

resto de la lando, ankaŭ en Salvadoro oni sentas kreskon de la intereso pri la Internacia Lingvo post la 66a Universala Kongreso en Brazilio.

Ĉinujo

- Post preskaŭ 50 jaroj, denove estas Esperanto-asocio en la ĉina provinco Yunnan. En la 12a ĝis la 14a de septembro estis kunveno por restarigi la asocion. Pli ol ducent esperantistoj, malnovaj kaj novaj, ĉeestis. Inter ili estis 78-jara pioniro,

Zhang Jingqiu, antaŭa delegito de UEA en Yunnan. Aperis raporto pri la kunveno en la ĵurnalo *Yunnan ribao*, kiu ankaŭ informas, ke estas dumil lernantoj de Esperanto en la provinco, plej-parte junaj.

Francujo


- Bela parketo en la centro de la sud-franca urbo Pau ĵus ricevis la nomon Zamenhof. La urb-estro de Pau, André Labarrère, fariĝis ministro en majo. Li du-foje subtenis leĝ-proponojn, kiuj celas meti Esperanton en egalan situacion kun aliaj lingvoj. Li estas honora membro de la loka Esperanto-societo, kaj pasint-jare li persone malfermis ekspozicion pri Esperanto, kiu restis unu monaton en la urba biblioteko.

Vjetnamujo

- De la 15a de aŭgusto okazas kurso ĉe kultur-domo en parto de la vjetnama urbo Hồ chí Minh. La kurson gvidas Ngô Chân Lý, kiu jam eldonis la unuan parton de lernolibro kun la nomo *Học quốc tế ngữ*.

Britujo

- La Esperanto-klubo de North Staffordshire, Britujo, aranĝis ekspozicion en loka kultura centro en la dua duono de oktobro. La lord-urbestro de Stoke-on-Trent malfermis la ekspozicion en la 13a de oktobro.



- Hispanujo: Dum la 23a Kataluna Esperanto-Renkontiĝo en Moià, profesoro Petro Nuez donas Esperanto-lecionon. Malantaŭ li estas parto de ekspozicio de infan-desegnaĵoj kolektitaj de la loka grupo. La renkontiĝo, kiu estis organizita de Kataluna Esperanto-Asocio, okazis en la 26a kaj 27a de septembro. Ĉeestis pli ol 250 homoj, ĉefe el Katalunujo sed ankaŭ el aliaj partoj de Hispanujo kaj suda Francujo. Ĉefa ero de la renkontiĝo estis la 21a aranĝo de la literatura konkurso Internaciaj Floraj Ludoj.

Informado

- Jam de kelkaj jaroj en FR Germanujo funkcias organizitaj reagoj al ĉiuj pli gravaj gazetaraj artikoloj, kiuj iel koncernas Esperanton aŭ la lingvan problemon. Tiu servo de Germana Esperanto-Asocio nomiĝas "Letero de leganto". Dum la pasintaj dek du monatoj aperis 51 tiaj reagoj en 25 gazetoj de pli ol loka karaktero. La servon gvidas d-ro Rudolf Fischer (Gustav-Adolf-Str. 2a, D-4401 Nordwalde, FR Germanujo).

Radio

- De la komenco de oktobro, loka radio-stacio en Forlì, Italujo, elsendas Esperanto-kurson sabatmatene. Oni plur-foje anoncis kaj antaŭ-prezentis la kurson en la semajnoj antaŭ ol ĝi komenciĝis. La lecionojn gvidas Luigi Tadolini de Itala Instituto de Esperanto. La nomo de la stacio estas Aria Radio, via Palazzola 32, I-47100 Forlì, Italujo.

Esperantologio

- En la Filozofia Fakultato de la Universitato de J.A. Komenský, Bratislavo, Ĉeĥoslovakio, fine de majo ĉi-jare, Stanislav Košecký defendis diplomon tezon sub la nomo "La komparo de la morfemaj strukturoj de la slovaka kaj Esperanto". Laŭ *Esperantisto slovaka*, kiu en sia numero 8-9/1981 aperigis unu-paĝan resumon de la studo, tio estis la unua esperantologia tezo prezentita en iu ĉeĥoslovaka universitato.

Scienco kaj teĥniko

- 172 sciencistoj, inĝenieroj kaj teĥnikistoj el 13 landoj parto-prenis kunvenon en Žilina, Ĉeĥoslovakio, kun la nomo "Apliko de Esperanto

en la scienco kaj teĥniko". El la renkontiĝo, kiu okazis en la 15a ĝis la 17a de aŭgusto, rezultis 240-paĝa libro kun artikoloj de 48 verkistoj, mendebla ĉe AESSR, Sobotské nám. 1735, CS-058 01 Poprad, Ĉeĥoslovakio.

Persone

Bengtsson

- La prezidanto de la sveda parlamento, Ingemund Bengtsson, firme kredas pri la estonteco de Esperanto kiel la sola ebla solvo de la internacia problemego rilate komunan lingvon. Li diris tion en la 7a de oktobro dum vaste rigardata sveda televida prezento *Kafé 18* (Kafejo je la 18a), responde al demando de la prezentisto. Li malakceptis la eblecojn de la angla lingvo ĉi-rilate. Bengtsson estis Alta Protektanto de la 65a Universala Kongreso de Esperanto en Stokholmo pasint-jare.

Wood

- Profesoro d-ro Richard E. Wood (Usono), redaktisto de la revuo *Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado*, estis nomita en septembro en la redaktan komitaton de naci-lingva revuo. Tiu estas *Kanada revuo de studoj pri la naciismo*, kiu aperas en la franca kaj la angla. D-ro Wood estas la 22a membro de la redakta komitato. Li ĉefe devos juĝi ricevitaĵajn artikolojn pri la lingva kaj kultura naciismo en Eŭropo kaj Ameriko.

Sekelj

- Dum septembro la jugoslava esperantisto kaj verkisto Tibor Sekelj vojaĝis en Venezuelo. En la sidejo de Venezuela Esperanto-Asocio li prelegis pri siaj vojaĝoj en brazila Sud-Amazonio kaj Ĉinujo. Pli da esperantistoj ĉeestis la duan el tiuj prelegoj ol iun ajn antaŭan kunvenon. Li ankaŭ prelegis al fakuloj pri muzeoj, kaj li estis intervjuita de la nacia televido kaj kelkaj ĵurnaloj.



- Su: En Ĉinujo ekzistas tri korespondaj lernejoj de Esperanto. La plej malnova estas tiu de Xinghua. La ceteraj du estis starigitaj ĉi-jare. Honora direktanto de la lernejoj estas ĉina Esperanto-poeto Armand Su, kiu estas ankaŭ honora konsilanto de tiu de Xinghua. Kurso de Armand Su aperas ĉi-jare en lingvista revuo *Yuwenyuandi*, eldonata de Gjuanghi Lingvista Asocio.

Schaapsveld

- Post vizito al la Universala Kongreso en Brazilo, la nederlanda ambasadoro, s-ro H. Th. Schaapsveld, skribis: "Mia mallonga ĉeesto en kunsido de la Komitato estis vere impona sperto kontraŭ la fono de mia memoro pri kunsidoj de UN-organoj, kie neniam eblis eviti la lingvan problemon." (Pri lia alia elpaŝo, vidu la septembran n-ron, p. 153.)

Wetzel

- Dave Wetzel, ano de Londona Esperanto-Klubo, sukcesis en majaj elektoj al la Konsilantaro de Grand-Londono. Li mem fariĝis la ĉefo pri transportado en tiu urba konsilantaro, do devas decidi pri ĉiuj demandoj rilate al aŭtobusoj, subteraj fervojoj kaj strata veturado. Li jam enkondukis senpagan veturadon por maljunuloj en la subteraj trajnoj.

EBLE VIA GRUPO volus havi pli da ekzempleroj de ĉi tiu revunumero?! Tio eblas. Unuopa ekzemplero kostas 3,00 guldenojn. Ekde 3 ekzempleroj vi ĝuos 33-procentan rabaton, kaj ekde 100 ekz. la rabato estos 50-procenta. Aŭfranko enkalkulita.

Gazetoj por ĉiu gusto

LA ESPERANTISTOJ laŭ sia naturo formas disan komunumon. Tial ili ofte provas kunveni internacie en kongresoj kaj similaj aranĝoj, sed tio estas por multaj tre kosta afero, mone kaj tempe. Skribaj ligoj do aparte gravas en nia kulturo. Leter-skribado parte anstataŭas interparolojn, kaj, kvankam ekzistas Esperantaj radio-elsendoj, nia ĉefa amas-informilo restas la Esperanta gazetaro.

Unua-vice la esperantistoj, por entute formi komunumon, devas havi informojn pri la tut-monda parolantaro de la lingvo internacia. Kiu gazeto plej efike plenumas tiun celon? Tiu en viaj manoj: la revuo *Esperanto*, kiun eldonas Universala Esperanto-Asocio. Ĝi raportas pri la progreso de Esperanto tra la mondo, pri la laboroj kaj atingoj de UEA kaj aliaj Esperanto-organizaĵoj, pri novaj libroj, pri esperantistaj kunvenoj okazintaj kaj okazontaj (precipe la Universala Kongreso de Esperanto) kaj multe pli. Al multaj legantoj plaĉas precipe la rubriko de mallongaj novaĵoj "Loke-Fake-Persone". *Esperanto* aperas monate, krom en aŭgusto, do dek unu fojojn jare.

Nur unu alia grava internacia gazeto okupiĝas ĉefe pri Esperanto kaj ĉiuj aspektoj de la tut-monda Esperanto-movado: la grand-paĝa (30x44cm.) *Heroldo de Esperanto*, kiu en 1980 aperis dek-kvin-foje. Ĝiaj kvar ĝis ok paĝoj estas ĉiam plen-plenaj de plej-parte mallongaj informoj.

Aliaj gazetoj gravaj en la disvastigo de Esperanto-novaĵoj estas la du-monata *Koncize*, kiu informas pri junulara agado, precipe okcident-eŭropa; kaj *Buda-peŝta informilo* (monata), kiu malgraŭ sia titolo servas ne nur hungarajn sed ankaŭ multajn aliajn orient-eŭropajn esperantistojn, kiuj pro diversaj kaŭzoj ne povas transpagi por regule ricevi la revuon *Esperanto* aŭ *Heroldo*. Kvankam ĝia aspekto estas malpli ol brila (oni ŝajne produktas ĝin per ordinara skrib-maŝino), la enhavo estas ofte ne-atendite interesa. La gazeto meritas legantojn ankaŭ ekster la propra mondo-parto.

Ankaŭ aliaj landaj Esperanto-revuoj ĝuas internacian famon. Inter ili estas alia hungara eldonaĵo, *Hungara vivo* (du-monata), tute en Esperanto, en kiu kompreneble aperas artikoloj pri Hungario kaj ties kulturo, sed ankaŭ multaj literaturaĵoj — rakontoj, poemoj kaj simile — de divers-landaj verkistoj. Hungaroj jam grave aldonis al la Esperanta literaturo. Tion faris sia-tempe la granda verkisto Kálmán Kalocsay (elp. koloĉaj: 1891-1976) kaj ties rondo (Julio Baghy, Lajos Tárkony kaj aliaj), precipe per la revuo *Literatura mondo*, kiu ĉesis aperi en la kvindekaj jaroj. *Hungara vivo* taŭge daŭrigas ĝian laboron.

Simile elstaras *El Popola Ĉinio* (monata). Same kiel Ĉinio mem, *EPC* en la lastaj jaroj ekzamenas kaj

transformas sin en ĉiu aspekto. Ne plu vortoj de la ŝtatestro dik-litere beligas ĉiun paĝon. Anstataŭe legantoj trovas ĉiam pli da novaj informoj pri la ĉina Esperanto-movado, verŝajne la plej rapid-kreska en la mondo hodiaŭ. Cetere plenigas la revuon artikoloj pri la kulturo, ekonomia progreso, historio kaj novaĵoj de Ĉinio, kaj ankaŭ jen kaj jen rakonto aŭ poemo. *EPC* estas ne nur la plej bela revuo en Esperanto, kun multaj koloraj fotoj, sed ĝi estas ankaŭ inter la plej malmulte-kostaj.

Pliaj konindaj landaj gazetoj estas *La brita esperantisto*, *Esperanto en Skotlando*, *L'Esperanto* (itala), *La revuo orienta* (japana) kaj du revuoj kun la sama nomo, *La espero*, el Svedio kaj Korea Respubliko.

Sed esperantistoj devas interesiĝi ne nur pri la Esperanto-movado. Pluraj niaj revuoj provas doni ponton al la "ekstera" mondo.

Kontakto estas kvaron-jara revuo de Tut-monda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), kaj en la lastaj jaroj preskaŭ ĉiu numero dediĉis sin plej-parte al unu afero: muziko, seks-rilatoj, infanoj, divers-landaj ekonomioj, ne-ordinaraj viv-manieroj, malarmado. Estante unu el la redaktistoj, mi ne diros, kiel pensiga, bela kaj nepre leginda estas *Kontakto*!

Monato, kiu aperas dek unu fojojn jare, estas provo fari en Esperanto ion similan al la grandaj naci-lingvaj novaĵ-revuoj, kiel la usona *Time*. La provo alportis en



sia du-jara ekzisto multajn mirige bone verkitajn artikolojn pri, ekzemple, nov-specaj vagonaroj, la pli-fortiganta situacio de la islamo, la usona ekonomio sub Reagan (elp. rejgn), provoj de Unesko pri nova internacia inform-interŝanĝa ordo. Same kiel la naci-lingvaj gazetoj donas kelkajn artikolojn pri la propra lando, ankaŭ *Monato* enhavas iom da novaĵoj Esperanto-movadaj. Malsame al la plej multaj tiaj gazetoj, ĝi enhavas literaturaĵojn, ludojn kaj konsilojn pri kuirado. Ali-vorte, io por ĉiu. . .

Malpli universale plaĉa estas *La kancerkliniko* (du-monata), sed tiuj, kiuj entute ŝatas ĝin, ofte trovas ĝin

la plej leginda el ĉiuj Esperantaj gazetoj. *Kontakto* pro sia ligiĝo al TEJO ne rajtas aperigi artikolojn, kiuj rekte atakas la politikon de iu ajn lando. En la praktiko, same mankas al *Monato* forte elmontrita politika starpunkto. Sed *La kancerkliniko* batalas ĉion en la mondo, kion la redaktistaro trovas batalinda. Oni povas trovi tian enhavon maltaŭga, kaj estas malverŝajne, ke la revuo povus trairi la poŝton de ĉiuj landoj. En la bildoj, cetere, la homoj de tempo al tempo portas ne multe pli da vestaĵoj, ol kiam ili naskiĝis, kaj ankaŭ tio povas al iuj efiki malagrabla (mi eĉ ne menci la montritajn agadojn). Ali-flanke, ĝuste la fotoj kaj desegnaĵoj aparte brilas en *La kancerkliniko*. Malfermante numeron, oni atendu artikolojn, rakontojn, poemojn, bild-rakontojn, raportojn, ŝercojn — sed ne trankvilon.

Sekso kaj egaleco (tri-monata) troviĝas tre klare en ideo-kampo, laŭ kiu viroj kaj virinoj devus fariĝi pli sam-raĵtaj (kaj sam-devaj), sed en tiu kampo tre multaj opinioj prezentiĝas, el ĉiuj mondo-partoj. La gazeto estas tiel interesa, ke oni ĝin tradukas kaj eldonas ankaŭ en la japana. Ĝin redaktas Anna Brennan, kiu kunmetis ĉi tiun numeron de *Esperanto*.

La granda celo de Mond-paca Esperantista Movado estas malarmado, kaj multajn artikolojn pri tio oni povas legi en ĝia revuo *Paco*. La politika vid-punkto, kiun ĝi prezentas, estas videble tiu de la orienta

legantaro, sed ĝiaj kunlaborantoj loĝas en ĉiuj mondo-partoj. En ĝia unua jar-kolekto aperis rakontoj kaj poemoj verkitaj en Esperanto kaj tradukitaj el pli ol dudek lingvoj. Per sia ekzisto mem, *Fonto* sendube donas pli da kuraĝigo al Esperanta verkado ol faras ĉiuj literaturaj premioj en la Movado.

Literatura foiro (du-monata) estas iom ali-speca, enhavante malpli da "literaturo" (kvankam ofte aperas tie bonegaj poem-tradukoj) kaj pli da artikoloj pri literaturo kaj kulturo ĝenerale, en kaj ekster la Esperanto-movado, kaj raportoj pri novaj Esperantaj libroj. Ĝin produktas grupo en Svislando, kiu donas al ĝi tre senteban, tute propran personecon. Kvankam ĝi ne utiligas multe-kostajn rimedojn, ĝi estas inter la pli belaj Esperantaj revuoj.

Por tiuj esperantistoj, kiuj estas tro junaj por ĝui la jam menciitajn gazetojn, ekzistas aparta revuo, la trion-jara *Juna amiko*. Ĝi tre taŭgas al kursoj kun junaj lernantoj. (Ĉi tiu numero de *Esperanto* estas provo pri simil-cela revuo por maturaj legantoj.)

Multaj aliaj revuoj meritas mencion, precipe tiuj direktitaj al homoj kun aparta interesiĝo. Fer-vojistoj (laboristoj ĉe vagonaro) havas ne nur gazeton sed tutan gazetaron, kies ĉefa ano nomiĝas *Internacia fervojisto*. Tiuj, kiuj volas scii pri ekster-teraj aferoj, povas legi la facilan sciencan revuon *Homo kaj kosmo*. Ĉu vi volas scii pri malgrandaj popoloj kaj ilia batalo



Eŭropo. Ĝi estas eldonata en interesa maniero. Ses numerojn jare faras la centra redaktejo en Bulgario, sed ankaŭ diversaj landaj MEM-grupoj eldonas propran numeron. En 1980, krom la bulgara serio aperis kvar pliaj numeroj, el Ĉeĥoslovakio, Germana Demokratia Respubliko, Hungario kaj Japanio. Precipe tiuj ofte enhavas valorajn literaturaĵojn.

Se vi preferas revuon tute literaturan, via plej bona ĉiu-monata fonto estas... *Fonto*! Ĝi naskiĝis antaŭ nur unu jaro, redaktata de la fama Esperanta verkisto W. Auld (elp. old) kaj eldonata en Brazilo. Same en Brazilo troviĝas, ĝis nun, la plej granda parto de ĝia

por politikaj kaj kulturaj rajtoj? *Etnismo* estas por vi. Aŭ rigardu birdojn, kaj legu pri ili en *La mevo* (mevo estas speco de naĝ-birdo). Por homoj sam-seks-amaj ekzistas *Forumo*. Pri UN kaj Unesko, tiuj mult-lingvaj organizaĵoj, okupiĝas *UN kaj ni*. Por anoj de grandaj kaj malgrandaj religioj aperas pluraj gazetoj, ekzemple *Espero katolika* (la plej malnova ankoraŭ eldonata Esperanta revuo) kaj la japana *Oomoto*.

Ĉu nenio pri ĝuste tio, pri kio vi volas legi? Nu, eble vi devos mem krei novan revuon. Tiel jam okazis multfoje...

Karl Pov


Inform-plena semajn-fino

FLUG-FOLIOJ sur la tabloj, afiŝoj sur la fenestroj, foto-serio sur la ŝrankoj, informiloj sur la muroj. Tuta ekspozicio vice staris sur tabuloj. El multaj landoj fluis al ni informiloj: grandaj, etaj, atento-kaptaj, simplaj, en lingvoj de la sveda ĝis la turka. Ni dubas, ĉu iam antaŭe ekzistis tia densa kolekto de informiloj en unu ĉambro! Kaj la publika reago? Nu, ne estis publiko. Tiu zorge kunmetita armilaro informis nur al konvinkitoj.

La konvinkitoj estis 22 personoj el 6 landoj, kiuj venis al la Centra Oficejo de UEA en Rotterdam de la 16a ĝis la 18a de oktobro por parto-preni kunvenon pri informado. Pli ol la duono el ili estis junuloj.

La prezidanto de UEA, G. Maertens (elp. martens), kaj E. Symoens (elp. simuns) faris la enkondukon por la kunveno. Ili gvidis la grupon "Vojoj kaj projektoj" pri sistemoj de informado. Tiu grupo studis la raportojn, kiujn kelkaj personoj sendis al la kunveno pro la alvoko en la julia numero de ĉi tiu revuo. La grupo faris liston de dek du gravaj kampoj por la informa laboro. Post longa kaj foje tre vigla interŝanĝo de ideoj, oni decidis, ke kvin el tiuj kampoj estas nun-tempe la plej gravaj. Ili estas: amas-komunikiloj (t.e. radio, televido, gazetaro ktp.), politikaj kaj soci-politikaj organizaĵoj, instruado kaj edukado, sciencaj kaj fakaj asocioj, kaj turismo.

La alia grupo laboris pri "Iloj". Antaŭ ili troviĝis kvar farindaj taskoj: preparo de nova internacia afiŝo, nova serio de naci-lingvaj flug-folioj (por anstataŭi malnovan 6-lingvan flug-folion de UEA), internacia foto-serio



por ekspozicioj, kaj afiŝo direktita al la junularo. La du lastaj ricevis la plej grandan atenton, ĉar ili estas jam parte pretaj. Grupanoj faris liston de ideoj por la foto-serio kaj decidis, kiuj vortoj devus aperi sur la junulara afiŝo.

D-ro V. Sadler montris al la kunvenintoj la eblecojn de la komputilo por modernigi la informan laboron.

Flug-folio: disdonebla inform-folio

Afiŝo: publika anonco presita sur papero por fiksado sur muro



La parto-prenintoj kaj la oficejoj de UEA en Rotterdam kaj Antwerpen plue laboros pri la taskoj elpensitaj dum la renkontiĝo. Aperos raporto pri la semajn-fino, kiun ni sendos al la parto-prenintoj kaj al aliaj agantoj en UEA kaj TEJO. La raporto enhavos liston de la informiloj ricevataj. Se vi deziras legi tiun raporton (kiu vere ne estas fin-raporto, sed komenc-raporto pri la laboro farota), vi povas mendi ĝin kontraŭ 5 respond-kuponoj de: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Ĝi estos preta en novembro.

Kaj la informiloj? Ili restis por nia listo. La parto-prenantoj? Tiuj ne restis, ili hejmen-iris. Sed tre verŝajne ili revenos iam — por daŭrigi la laboron.

S. MacGill (elp. mkgil)

120 facilaj paŝoj

Sylla Chaves (elp. sila ŝavis) nun verkas du lerno-librojn kaj aliajn lernilojn. Unu el la libroj estas en Esperanto, la alia en la portugala. La nomo de la tuto estas *Aŭdu kaj lernu*. La kurso enhavas 120 malgrandajn facilajn paŝojn. Unu rakonto kaj tridek kantoj donas intereson dum la lernado, kaj multaj bildoj helpas instrui la novajn vortojn. Estas pluraj demandoj en la du libroj kun respondoj en la fino.

JAM aperis en Brazilo kurso de Sylla Chaves kun la nomo *Aŭdu kaj lernu*. Venont-jare aperos plia kurso de Chaves kun la sama nomo. La ĉefaj gvid-linioj de la nova kurso estos jenaj:

Ĝi konsistos el tri libroj: Esperanta lerno-libro, naci-lingva (portugala) lerno-libro kaj du-direkta vortaro. Kun ĝi estos ses kasedoj nur en Esperanto. Ĉiu leciono estos dividita en ses malgrandajn paŝojn. En la unua parto, ĉiu paŝo enhavos dek novajn vorterojn, kaj en la dua parto, dudek. Dum oni lernas, oni samtempe sekvas rakonton, "Nova amiko inter ni". La kurso enhavas multajn kantojn, kies muziko estas aŭ jam konata aŭ speciale verkita. En ĉiu kanto troviĝas nur vortoj, kiujn oni lernis pli frue en la kurso, tiel ke oni povas kompreni la kantojn sen peno.

Ses centroj de la Esperanta kulturo

Internacia Esperanto-Muzeo en Wien

Internacia Esperanto-Muzeo en Wien (IEMW) estis starigita de Hugo Steiner (elp. ŝtajnr: 1878-1969). En 1929 li sukcesis aranĝi, ke ĝi fariĝu fako de Aŭstria Nacia Biblioteko. La aŭstra ŝtato konsentis doni la necesajn ejojn kaj havigi rimedojn por prizorgi la posedaĵojn de la muzeo.

La muzeo havas 17 900 volumojn. Krome ĝi havas man-skribaĵojn, dokumentojn de famaj esperantistoj (inter ili multajn de Zamenhof mem), muzik-verkojn, diskojn, son-bendojn, kasedojn, filmojn, lum-bildojn, fotojn, gazet-eltondaĵojn, foliojn (informiloj, kongresaj dokumentoj, turismaj gvidiloj ktp.), bild-poŝt-kartojn, glu-markojn kaj multajn aliajn aferojn.

Estas 11 katalogoj sur paper-folioj kaj ankaŭ katalogoj en la formo de libro. La direktisto kaj kunlaboranto laboras plen-tempe en la muzeo, kiu estas malfermita por vizitantoj kaj legantoj lunde, merkrede kaj vendrede de 09h00 ĝis 15h30. Estas konstanta ekspozicio en tri salonegoj kaj de tempo al tempo ankaŭ specialaj ekspozicioj. Interesatoj en Eŭropo povas prunti librojn kaj gazet-kolektojn pere de Aŭstria Nacia Biblioteko.

W.H.

Biblioteko Butler

Biblioteko Butler troviĝas en la oficejo de Esperanto-Asocio de Britujo. Montagu Butler (elp. montagju batle) starigis ĝin en 1922 kaj prizorgis ĝin ĝis sia morto en 1970 — preskaŭ 50 jarojn. Ĝi enhavas interesajn kaj gravajn librojn kaj aliajn objektojn de la plej fruaj jaroj de la Esperanto-movado kaj -lingvo ĝis hodiaŭ. La proksimumaj nombroj estas 11 000 libroj, 1 000 binditaj volumoj de gazetoj, 10 000 poŝt-kartoj, glu-markoj kaj fotoj, kaj 16 000 paperaĵoj. La eroj estas klasitaj laŭ sistemo de Butler mem. La katalogo estas aranĝita laŭ klaso kaj nomo de la verko, kaj parte laŭ verkinto kaj tradukinto. La bibliotekisto estas volontulo, kiu laboras sabate, kiam eblas. Oni ne rajtas prunti la librojn, sed la bibliotekisto volonte akceptas perpoŝtajn demandojn.

P.M.

Bulgara Nacia Biblioteko

La nacia bulgara biblioteko *Kiril i Metodij* havas unu el la plej riĉaj kolektoj en Eŭropo. En tiu kolekto, ankaŭ la Esperanta literaturo havas sian lokon. La Esperanta fako havas librojn eldonitajn en Bulgario kaj eksterlande, paroladojn, studojn pri Esperanto, informilojn ktp. Granda parto el tiu kolekto, aperinta je la fino de la pasinta jarcento kaj komenco de la nuna, estas nun tre valora.

La biblioteko estas riĉa je bulgaraj Esperanto-revuoj. Plej interesaj inter ili estas *Lumo* kaj *Rondiranto*, aperintaj en la komencaj jaroj de ĉi tiu jar-cento.

Volumo: aro da paperoj kunligitaj por formi libron

Dokumento: grava skribaĵo konservata

Glu-marko: fiksebla paper-peceto, simila al poŝt-marko

Bindi: kunligi paperojn por formi libron, kaj surmeti mal-molajn kovrilojn

Interlingvistiko: scienco pri lingvoj uzataj aŭ uzeblaj en internaciaj rilatoj

Oficistoj de la nacia bulgara biblioteko zorgas pri la Esperanto-fako. La biblioteko pruntas al pli ol 350 bibliotekoj en la mondo. Eksterlandaj esperantistoj povas uzi ĝian Esperanto-kolekton pere de siaj pli gravaj naciaj bibliotekoj.

Krom la nacia biblioteko, ankaŭ la Akademia kaj Universitata Bibliotekoj havas riĉajn Esperanto-kolektojn.

D.P.

Biblioteko Hodler

Biblioteko Hodler estas unu el la tri aŭ kvar plej grandaj kaj gravaj Esperanto-kolektoj. Ĝi komencis sian ekziston en 1908 simple kiel la kolekto de Svisa Esperanto-Societo. Poste Hector (elp. hektor) Hodler, kiu starigis UEA, aĉetis la kolekton. Kiam li mortis en 1920, li donis ĝin al UEA. La kolekto restis en Ĝenevo ĝis 1962, kiam oni transportis ĝin al la domo de UEA en Rotterdam.

Inter la pli interesaj posedaĵoj de la biblioteko estas la unuaj eldonoj de multaj verkoj, kvankam bedaŭrinde



ne de la Unua Libro de Esperanto. Estas pluraj man-skribaĵoj de Zamenhof kaj aliaj gravaj esperantistoj. La biblioteko havas ankaŭ la korespondaĵojn inter Waringhien kaj Kalocsay (elp. varangja kaj koloĉaj).

Verŝajne biblioteko Hodler estas la sola grava Esperanto-biblioteko, kiu ne havas konstantan prizorganton. Katalogo ekzistas, sed ĝi estas plej-parte man-skribita kaj ne donas ĉiujn dezirindajn informojn. Oni ne rajtas prunti la librojn kaj revuojn, sed oni povas uzi ilin surloke aŭ mendi foto-kopiojn.

A.B.

Centro de Dokumentado kaj Studo pri la Internacia Lingvo

En la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds (elp. la ŝodfo), Svislando, estas fako kun la nomo Centro de Dokumentado kaj Studo pri la Internacia Lingvo. Ĝia nomo en la franca estas *Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale* (CDELI).

En tiu dokumentejo oni trovas milojn da libroj, revuoj, leteroj, fotoj kaj kongres-raportoj en aŭ pri Esperanto. Oni povas ankaŭ studi maloftaĵojn: interalie informilojn pri la plej diversaj lingvoj internaciaj. Studante tiujn ĉi malnovaĵojn, oni komprenas, kial

Esperanto sukcesis, dum la aliaj lingvo-proponoj ne progresis.

CDELI konsistas el granda labor-salono, kie de 1967 ĉiu-lunde laboras bibliotekisto dum la mateno, helpate de sin-donemaj esperantistoj. Ili ordigas la dokumentojn kaj pretigas paper-folietojn por la biblioteka katalogo, kiu staras en apuda salonego. Kontraŭ la muroj, estas konservataj revuoj kaj dokumentoj en skatoloj. En moveblaj ŝrankoj, kiuj troviĝas en subtera ĉambrego, pli ol dek mil libroj en aŭ pri Esperanto kaj pri interlingvistiko estas je la servo de esplorantoj.

Apud la salono de CDELI estas la muzeeto Edmond Privat (elp. edmo priva). Tie oni povas konatiĝi kun la fama esperantisto, kiu verkis la poemaron *Tra l' silento* kaj la gravajn librojn *Historio de Esperanto*, *Vivo de Zamenhof* kaj *Vivo de Gandhi*. Privat estis amiko de Zamenhof kaj de Mahatma Gandhi.

C.G.

Aŭstralia Nacia Esperanto-Biblioteko

Tiu estas la plej malgranda biblioteko, kiun ni mencias ĉi tie, ĉar ĝi estas tute nova. Nur ĉi-jare oni decidis starigi ĝin. La unuaj eroj en la biblioteko estis la personaj kolektoj de diversaj aŭstraliaj esperantistoj. Ankaŭ kelkaj kluboj donacis librojn kaj revuojn. Mona helpo venis de esperantistoj kaj lokaj asocioj. La biblioteko serĉas konstantan ejon – nun-tempe ĝi troviĝas ĉe Aŭstralia Instituto de Internaciaj Aferoj en Canbera (elp. kanbera). Por la katalogo ĝi uzos la saman sistemon kiel Internacia Esperanto-Muzeo en Wien.

A.B.

Artisto, kiu tranĉis siajn flugilojn

KOMENCANTO, kiu deziras progresi, devas multe legi. Legado fortigas nian kapablon rapide kompreni, kaj eĉ skribi, ĉar per legado ni lernas la kutimojn de la lingvo kaj multajn novajn vortojn.

En Esperanto jam ekzistas multaj legindaj libroj. Sed ne ĉiuj taŭgas por komencanto. Simile, infanoj ne povas tuj ĝui la plej grandajn verkojn de nacia lingvo! Eble, ĝuste pro bezonoj de alta arto, la vortoj aŭ la vort-ordo ŝajnas tro malfacilaj. Ne-sperta leganto ne ĝuas legadon, se li aŭ ŝi devas en ĉiu momento halti, serĉi en vortaro, pensi, kion la verkisto volas diri.

Julio Baghy (elp. bogi), hungaro, 1891-1967, estis granda Esperanta verkisto. Li verkis romanojn, poemojn, verkojn por la teatro kaj diversajn verketojn. Li estis serioza artisto, kiu multe pripensis sian arton. Sed li ankaŭ multe instruadis. Li gvidis multajn kursojn en Hungario, kaj instruadis tie preskaŭ ĝis-morte. Kiam li estis juna, li vizitis multajn aliajn landojn, kie li gvidis kursojn, parolis al lokaj grupoj, aŭ ekzamenis esperantistojn. Li faris tian laboron iam en dek kvin eŭropaj landoj. Do, li tre bone komprenis la proble-

Glata: sen ia elstaraĵo

Hura!: ĝoja krio

Strio: longa mallarĝa parto, kun aparta koloro

Viktimo: persono suferanta aŭ mortinta pro iu okazaĵo

mojn de komencantoj; kaj dum sia tuta vivo li restis granda amiko de komencantoj.

Li verkis unu belan romaneton, *La verda koro* (1937), speciale por ili. La romano komenciĝas kiel eble plej facile, kaj pli malfaciliĝas nur tre malrapide. Ĝi tamen rakontas interese pri amindaj personoj. Jen la komenco:

“Lernoĉambro en siberia Popola Domo. Unu pordo, du fenestroj. La pordo estas malalta, la fenestroj estas mallarĝaj.”



Amiko de komencantoj: Julio Baghy (1891-1967)

Sed eĉ la fino ne estas tre malfacila:

“Kaj Nadai komencas senti, ke la maro estas senkora, kruela monstro... Ondo venas, forviŝas eĉ tiun strian postsignon kaj ĝi estos tiel glata, kvazaŭ nenio estus tranĉinta ĝian supron... Adiaŭ, Siberio!”

Poste, la komencanto ne trovos tro malfacilajn liajn grandajn romanojn pri milit-kaptitoj en Siberio, *Viktimoj* kaj *Sur sanga tero*. Jen pli da vortoj, sed tiel aranĝitaj, ke oni facile komprenas; multaj inter-paroladoj, kiuj sonas tre naturece. Lia plej longa kaj malsimpla romano, *Hura!*, bezonis iom pli diversajn rimedojn, ekzemple pli grandan vortaron, sed la lingvaĵo restas tre klara, do facile komprenebla.

Baghy verkis tutan poemaron, *La vagabondo kantas*, speciale por komencantoj; kaj lernantoj, kiuj amas poezion, baldaŭ povos ĝui preskaŭ ĉiujn liajn poemojn. Multaj el liaj verkoj por la teatro estas sufiĉe simplaj lingve por legado en klubejo aŭ lerno-ĉambro. Jen valora ekzerco pri parolado – aŭ aŭskultado – por progresema lernantoj.

Julio Baghy estis granda artisto. Artisto deziras havi kiom eble plej da rimedoj kaj la plej grandan liberecon. Sed li estis ankaŭ tre bona homo, kiu amis la homojn. Li vere amis siajn lernantojn kaj ĉiujn komencantojn – nur ne tiujn “ĉiamajn komencantojn”, kiuj foje kolerigis lin! Pro tiu amo, li verkis, plej ofte, tre simple, por ke la verkoj estu utilaj al ĉiuj.

Li faris multajn malfacilajn taskojn por Esperanto: sed eble lia plej malfacila sin-dono estis tiu limigo de siaj verkistaj rimedoj. Li volis, kaj povis, flugi pli altan, sed, por servi la homaron, tranĉis la proprajn flugilojn. Komencantoj, kiuj deziras progresi, amu lin, kiel li amis vin; studu liajn modelajn verkojn!

Marjorie Boulton (elp. maĝri boltn)

Joe kaj la Papo

KIAM MI ESTIS JUNA en 1947, mi laboris por mia lando, Aŭstralio, ĉe Unuiĝintaj Nacioj (UN) en Nov-Jorko. Mi estis diplomato (t.e. supera ŝtata oficisto pri inter-naciaj aferoj). UN tiam ne havis propran domon sed kunvenis en granda konstruaĵo sur Long Island (elp. aĵland). Ĉiun tagon ni devis vojaĝi tri aŭ kvar horojn per veturilo.

Plaĉis al mi la laboro kontraŭ la milito kaj por la homaro. Mi helpis s-inon Eleanor Roosevelt (elp. elenor rozvelt) verki la Universalan Deklaracion pri Homaj Rajtoj (skribaĵo pri homaj rajtoj, pri kiu la ŝtatoj en UN konsentis en 1948). Mi helpis en la laboro kontraŭ militiloj. Mi helpis la popolon de nia apuda lando, Indonezio, ekesti libera, kaj la popolon de Israelo havi sian propran landon.

Mi ankaŭ kun-sidadis kun aro da homoj, kiuj parolis pri nova domo por UN ĉe la flanko de la mar-brako inter Long Island kaj Nov-Jorko. La konstruisto volis fari tre altan konstruaĵon,



sed UN ne havis multe da mono, do ĝi devis esti malpli alta.

Tiam mi iris al Aŭstralio, Svislando kaj aliaj landoj, kaj dum longa tempo mi ne vizitis la UN-domon, kiun ni pri-parolis en la kun-sidoj. Mi nur vidis bildojn.

Fine, tamen, post multaj jaroj Aŭstralio sendis min de-nove al Nov-Jorko. Mi laboris por mia ŝtato en la granda domo, pri kiu mi kun-sidis kiam mi estis juna diplomato.

Mi tre ŝatis la laboron en “mia” domego kontraŭ milito kaj por la homaro. Ni verkis novan regularon por la maro. Ni helpis pri paco (mal-milito) en Azio kaj Afriko. Estis nia deziro, ke Papua Nov-Gvineo, kiu pli frue apartenis al Aŭstralio, estu libera kaj ano de UN. De-nove mi laboris por malhelpi la uzadon de militiloj. Foje la urbestro de Hiroŝima vizitis min. Kiel Vic-Prezidanto (anstataŭa prezidanto) de la Ĝenerala Asembleo (la ĉefa kun-veno de UN) mi sidis en la alta seĝo super la kun-veno de 150 landoj.

Mi estis tre kontenta pri “mia” domego. Kiam vizitantoj venis el Aŭstralio, mi iris kun ili por vidi la grandajn ĉambrojn kun belaj bildoj kaj artaĵoj, kiujn diversaj landoj donacis al UN. Mia plej granda plezuro estis kiam miaj gefiloj vizitis min, kaj mi povis montri ‘mian’ domegon al iliaj infanoj.

Bona amiko mia en UN estis Joe (elp. ĝo), unu el la homoj, kiuj pri-zorgis la pordojn de la domego. Mi ekkonis lin, kiam li rakontis al mi, ke li vizitis mian landon kiel sportisto. Mi informis lin, ke mi vidis lin ludi en Aŭstralio. Joe ne tute kredis, sed mi trovis inter miaj paperoj la inform-libreton pri tiu ludo kaj petis Joe sub-skribi sian nomon!

Post tiu tago, kiam mi en-iris la domegon, mi ĉiam parolis kun Joe. Kiam mi donis feston por personoj, kiuj foje estis en Aŭstralio, li vizitis nin en nia hejmo.


Iom antaŭ ol mi reiris al Aŭstralio, Joe savis la vivon de maljuna virino. Kelkajn tagojn poste li informis min, ke oni petis lin parto-preni en televida prezento. Mi faris vid-bendon de la prezento (per vid-bendo oni povas rerigardi televidan prezenton poste) kaj donacis ĝin al Joe antaŭ mia vojaĝo.

Nun kiam mi estas en Aŭstralio, Joe kaj mi ankoraŭ inter-ŝanĝas krist-naskajn kartojn. Kiam mi faras paroladon pri UN, mi sendas ĝin al li.

Antaŭ kelkaj monatoj mi ricevis libron pri la vizito de la Papo al UN (la Papo estas la estro de la rom-katolikaj kristanoj). La bildoj de la domego estis tre belaj. Sed tio, kio plej plaĉas al mi, estas bildo de la Papo en la granda ĉambro de la Ĝenerala Asembleo. Ĉar apud li, alte super ĉiuj, estas mia amiko, Joe.

Ralph Harry (elp. ralf hari)

Kimono estas praktika art-verko



Kimono havas ĉiam la saman formon kun rektaj flankoj.

“HO, BELEGE! Vi aspektas kvazaŭ pupo!”
“Kia ŝtofo! Kiel delikata desegno! Kiom ĝi kostas?”
“Ĉu vi permesas ke mi tuŝu vian veston?”

Kiam mi en eksterlando portas mian nacian veston, la kimonon, multaj kun intereso atakas min per demandoj pri ĝi. Do, kia estas la hodiaŭa japana kimono?

Kimono estas unu-peca vesto longa preskaŭ ĝis la planko. Ĉiu speco de kimono, ankaŭ la porvira kaj eĉ la subvestaĵo, havas la saman formon kun rektaj flankoj.

La diversaj specoj de kimono diferencas nur pro la tekso-maniero, la kolorigo-maniero kaj la desegno de la ŝtofo. Ili diferencas ankaŭ per la longeco de la pendanta maniko. Kimonoj por viroj estas simplaj, sed porvirinaj kimonoj estas belaj kaj diversaj.

Kolorigo-manieron oni povas dividi en du grupojn. La plej ofta estas *komono*, kiu havas tre diversajn desegnojn. La simplaj estas por la hejmo, la luksaj estas por festo (vidu la fotojn). Ĉe tiu speco, malgrandaj desegnoj kovras la tutan longon de la kimono-ŝtofo, kiu havas larĝon de 36 cm kaj longon de 11 m. Oni kolorigas ĝin mane, uzante specialan paperon truitan laŭ la desegno. Alia speco estas la luksa *ebao*, en kiu la desegno daŭras trans la kudro-linioj (vidu la foton). La kolorigado estas tre delikata arta laboro, kiun oni faras mane.

Kimono kun maniko ne-longa (45-55 cm) estas por ĉiuj, sed longa (80-100 cm), nomata *hurisode* (penda maniko), estas nur por la festa vesto de fraŭlino.

Kimonon oni surmetas fermante ĝin antaŭe tiel, ke la maldekstra flanko kovras la dekstran. Se oni fermas ĝin malĝuste... tio estas por mortinto. La nun-tempa porvirina kimono estas pli longa ol la korpo de la portanto. Oni ĝustigas ĝian longecon per ŝnuro ĉirkaŭ la korpo. Ĉar la larĝeco kaj longeco de kimono ne estas



**Maldekstre: simpla *komono*.
Dekstre: luksa divers-kolora *komono*.**



Simpla speco de ebao.

fiksitaĵ, pluraj homoj povas komune uzi la saman kimonon.

Ekster la kimono, iom alte, oni portas zonon. Ĝi nomiĝas *obio*, kaj kutime estas kvar metrojn longa. Oni elektas simplan obion por simpla kimono, luksan por lukso.

Sur la piedoj oni portas *tabiojn*, kutime blankajn. Ili estas speco de ŝtrumpeto, kiu dividiĝas inter la unuaj du pied-fingroj. Sur la tabioj oni portas *zôriojn* (elp. *zohri*) — kiuj estas plataj ŝuoj kun V-forma tenilo inter la unuaj du pied-fingroj — aŭ por simpla kimono, *getaojn* (alia speco de ŝuo, simila al *zôrioj*).

Por aspekti bele, estas grave elekti la ĝustan obion kaj aliajn aldonajn aferojn, taŭgajn por la speco kaj desegno de la kimono.

Bedaŭrinde, nun-tempe ni ne plu portas la kimonon en ĉiu-taga vivo, sed nur en festaj kaj japanecaj okazoj. Sed kiam ni vestas nin per kimono, ni sentas korekcion, aŭ pro ĝia beleco, aŭ pro ĝia historio, aŭ pro ĝia firma teno-maniero, kaj ni nature sentas la deziron moviĝi bele.

Tial la kimono estas ne nur praktika vesto, sed samtempe arta verko — de la desegnisto, de la teksisto kaj kolorig-artisto — kaj ankaŭ de la portanto mem.

Krizantemo

Teksi: maniero produkti ŝtofon

Maniko: parto de vestaĵo, kiu kovras la brakojn

Kudri: kunligi pecojn de ŝtofo per fadeno

Zono: ŝnuro aŭ longa peco de ŝtofo, kiu ĉirkaŭas la korpon, por ligi la vestaĵojn

Longa decidado, rapida farado

En japanaj laborejoj, la estroj ne faras gravan decidon, ĝis ĉiu parto de la laborejo havis tempon pri-paroli ĝin. Antaŭ ol fari la decidon, oni devas pensi pri ĉiu malgranda demando, kiu ligiĝas al ĝi. Tio povas daŭri semajnojn aŭ eĉ monatojn. Sed poste oni povas tre rapide fari la aferon kiun oni decidis.

En Usono okazas malsimile. Tie la ĉefoj de laborejo havas tre grandan povon. Ili rajtas fari decidojn sen antaŭe demandi al siaj subuloj. Tial ili ne povas kompreni, kial en Japanujo oni uzas tiom da tempo por tio. Sed en usona laborejo oni poste bezonas multe pli da tempo por fari la aferon, kiun oni decidis, ĉar oni ne jam sufiĉe pri-pensis ĝin.

MULTAJ okcidentaj komercistoj vizitas Japanion por paroli kun komercaj organizaĵoj tie. Precipe usonanoj ofte esperas, ke la japanoj tuj faros decidon pri ilia propono. La espero pli-grandiĝas, ĉar ili ne aŭdas “Ne!” el la buŝoj de japanaj aferistoj (t.e. komercistoj, organizistoj). La okcidentanoj revenas al siaj landoj kaj trovas, ke nenio, laŭ ilia sento, okazas en la japana organizaĵo. Nenia reago venas el trans la maro. Ili perdas paciencon kaj komencas pensi, ke japanoj estas ne-efikaj decido-farantoj. Ĉu vere? Ne!

Ankaŭ en Japanio, la finan decidon faras, almenaŭ laŭ-forme, la homoj kun la plej granda respondeco pri la donita afero.

Praktikan aranĝon, aŭ eĉ la enhavon mem, de la decido tamen faras homoj en mezaj niveloj de la organizaĵo. Kiam la okcidenta aferisto foriras, la japana kunparolinto, ofte grava persono, turnas sin al siaj subuloj por trovi ĉu la propono estas bona, praktika, kaj frukto-dona.

Ofte en Japanio gravuloj ne scias detalojn. Ili okupas altajn lokojn ne pro specialaj scioj, sed pro ĝeneralaj spertoj, kiujn ili ekhavas dum ili transiras de unu kampo al alia en la sama organizaĵo dum multaj jaroj. Kiam la detaloj fariĝas klaraj en iu fako, ekzemple tiu de aĉetado, vendado aŭ internaciaj aferoj, tiam la propono komencas iri de tiu fako al aliaj, ekzemple al la rilataj kaj ali-specaj fakoj pri mon-aferoj, leĝaro kaj direktado. Oni pasigas specialan proponilon de unu fako al alia. Oni ankaŭ interfake konsiliĝas. Poste la propono fine atingas la ĉefulojn de la organizaĵo. La vojo estas tre longa. Ĉi tio postulas semajnojn aŭ monatojn. Nur nun la okcidentaj aferistoj ricevas ian videblan reagon de la japanoj. Manko de tuja respondo ne ĉiam signifas rifuzon.

Detaloj: malgrandaj faktoj pri iu afero

Respondeco: devo porti la rezulton de iu afero

Por averto, ankaŭ notinda estas la fakto, ke, kiam ili ne intencas akcepti la proponon dekomence, la japanoj tamen ne diras rekte “Ne!”, sed uzas multajn aliajn manierojn por montri sian rifuzon. Ekzemple, ili diras kun delikata parol-maniero: “Tio estas bona ideo. Ni pristudos vian proponon,” por ne tuj malĝojigi la eksterlandan gaston per rekta rifuzo: “Ne, ni tute ne interesiĝas!” Laŭ sin-teno pri ĉi tiu kaj ceteraj aferoj, eŭropanoj ŝajnas iom proksimaj al japanoj, kompare kun usonanoj.

La japana metodo de decido-farado povas konduki al divido, aŭ eĉ nebuligo, de respondeco inter ĉiuj homoj en la organizaĵo. Ĝi certe postulas tre multan tempon, do ĝi estas “ne-efika”, sed ĝi havas ankaŭ rimarkindan valoron. Nome, kiam la fina decido estas farata, ĉiuj homoj jam scias pri la propono kaj pri sia parto de la necesa laboro. Rezulte, la efektivigo de la proponita

plano estas nekredeble rapida. Eble ne ĉiuj estas kontentaj pri la propono, sed jam la afero rilatas al la tuta organizaĵo, kaj ĉiuj daŭre partoprenas.

Male, usonaj aferistoj kun granda respondeco tuj faras decidon kaj poste havas malfacilecon en ĝia efektivigo per siaj subuloj. Por ellabori detalojn, ili bezonas multan tempon. Se mallonge kompari la usonan kaj la japanan manierojn fari decidojn, la usona estas rapida en decidado sed ne-efika en efektivigo, dum la japana estas ne-rapida en decidado sed efika en efektivigo.

La supro estas vera ĉefe pri grandaj komercaj organizaĵoj en Japanio. Kompreneble, tro da ĝeneraligo estas danĝera, sed se oni scius la ĝeneralan diferencon kaj pretus pacience atendi, oni povus pli bone labori kun japanaj organizaĵoj.

Shuichi Yamakawa (elp. ŝuiĉi jamakaŭa)

Kio ligas hindon kaj aŭstralianon?

Eble vi ofte ludas kun unu amiko. Kun tiu, vi amikas per la manoj (aŭ per la piedoj, se por via ludo oni uzas la piedojn). Kun alia amiko vi eble preferas paroli. Vi amikas kun ĉi tiu homo per la buŝo. Tiel, povas esti, ke diversaj partoj de vi estas gravaj por diversaj amikoj.

Mia lando, Hinda Unio, havas multajn amikojn. Ĝi havas ankaŭ multe da “partoj”; ili estas la diversaj homoj en la Unio, kiuj kune havas similan intereson. Por unu amiko, unu parto estas grava; por alia amiko, alia parto.

EKZEMPLE, pensu pri la arabaj landoj. Ili estas amikaj al nia lando. Ilia ĉefa religio estas Islamo. Tial, por ili, la grava parto de Hinda Unio estas ĝia granda islama grupo. Tre multaj hindoj nun laboras en arabaj landoj. La hindoj, kiuj laboras tie, estas grand-parte islamanoj. Iuj araboj vizitas nian landon. Ili ofte persone ekkonas islamajn hindojn.

Sur la alia flanko, la orienta, nia najbaro estas Bangladeŝo. Ĝia ĉefa lingvo estas la bengala. Sekve, bangladeŝanoj preferas amikiĝi kun tiuj hindoj, kiuj parolas per ilia lingvo. Okcidenta Bengalio, kie tiuj hindoj loĝas, estas do la plej grava ŝtato de la hinda ŝtataro (Hinda Unio) por la orienta amika lando.

Sed, Bangladeŝo estas ĉefe islama lando. Kial ĝiaj loĝantoj ne amikiĝas prefere kun islamanoj, anstataŭ kun la (ĉefe ne-islamaj) okcident-bengaloj? Ĉu la lingvo estas pli grava ol la religio? Por ili jes. La 21a tago de februaro estas ĉe ili grava — la Lingvo-tago. Tiun tagon en 1952, iuj junuloj mortis, dum ili publike defendis la rajton uzi la bengalan.

La popolo de Srilanko parolas ĉefe du lingvojn — la sinhalan kaj la tamilan. Neniu hinda grupo aŭ ŝtato havas la sinhalan kiel sian lingvon. Sed la tamilan oni

parolas en kaj ĉirkaŭ la hinda ŝtato Tamilio. Do, kompreneble, la tamila lingvo servas kiel la plej grava ponto inter la du landoj.

Interese, la tamila estas ligo ankaŭ kun la iom fora Malajzio. Multaj malajzianoj parolas tamile.

Mi parolis pri lingvoj kaj religioj kiel “partoj” de nia lando. Ĝi havas ankaŭ aliajn “partojn”. Ekzemple, la plimulto de la hindoj estas ne-mangantoj de viando aŭ



fiŝaĵo. Tiu parto de nia popolo aparte interesas tiujn fremdulojn, kiuj sekvas la saman regulon. Tia aŭstraliano iam diris al mi, “Via lando estas la sola, en kiu homo kiel mi dum vojaĝado ne havas problemon pro malprefero de viando kaj fiŝaĵo. Mi estas ordinario tie.”

Probal Daŝgupto

Miriga sperto ĉe nova lernejo

Jonathan Löwenstein (elp. ĝonatan levenŝtajn) estas angla junulo de 17 jaroj. Dum dek jaroj li loĝis en Israelo kaj iris al lernejo tie, sed li ĵus revenis al Britujo, kie li finas siajn lerneajn studojn. Kia ŝajnas al li la angla lernejo post la israela? Estas rimarkinde, ke li studas nur tri aferojn, kaj en liaj klasoj estas nur tri ĝis dek du lernantoj. (Tio okazas nur ĉe la plej aĝaj lernantoj, kiuj jam preskaŭ finis sian lernejan edukon. La pli junaj tamen devas studi ĉion, kaj en iliaj klasoj estas multe pli da homoj.

Jonathan trovis, ke en lia angla lernejo, la plej aĝaj studantoj estas liberaj fari preskaŭ ĉion, kion ili deziras. Por ili la vivo estas tre facila, do ili ne multe pensas pri publikaj aferoj. Israelo estas malpli riĉa lando, kaj tie la lerneaj studantoj jam havas tre fortan intereson pri la ekstera mondo.


KIAM MI ALVENIS, la angla lernejo ŝajnis al mi tre bona, eĉ bonega. Kompreneble, necesas memori, ke mi parolas nur pri la sesa klaso, kiu enhavas gejunulojn de 17 kaj 18 jaroj. Estas tre malsame por la pli junaj gelernantoj. Mi studas tri fakojn: la modernan historion, la anglan literaturon kaj ekonomian sciencon.

La unua, kaj plej rimarkebla, diferenco estis la nombro de homoj en la klaso. En Israelo estas kutime 30 aŭ pli, sed ĉi tie ni estas tri homoj por moderna historio, 5 por ekonomia scienco kaj 10 ĝis 12 por angla literaturo. La lernantoj ricevas multe pli da libereco: ili rajtas vesti sin, kiel ajn ili deziras, kaj la plej aĝaj havas apartan ĉambron, kie estas permesate fumi. Ni havas multe da libera tempo, kiam ni povas labori aŭ sidi en tiu ĉambro.

Ĝenerale, la instruistoj agas kvazaŭ ni estus plenkreskuloj. Se oni ne plenumas taskon ĝusta-tempe, ili ne plendas. Ili opinias, ke tio estas problemo de la lernanto, ne de la instruisto. Ĉar la klasoj estas malgrandaj, ne ekzistas problemoj pri konduto. La lernantoj devenas el tre diversaj lokoj — de Hinda Unio, Niĝerio, Greklando, Cipro, Turkujo ktp.

Tute en la komenco mi rimarkis, ke ne ekzistas granda diferenco inter la homoj. Mi rekonis precize la samajn personecojn. La homoj havas similajn problemojn kun siaj gepatroj ("Ili opinias, ke mi devus reveni hejmen je duono post nokto-mezo..."). Mi trovis la ĉefan diferencon en rilato al drogoj kaj sekso. (Drogo estas produktaĵo uzata interalie por kuracado, sed ankaŭ foje uzata kontraŭleĝe por aliaj celoj, kiel en la lernejo de Jonathan! Tiaj drogoj estas ekzemple morfino, opio kaj haŝiŝo.)

Ŝajnas al mi, ke en la angla lernejo la lernantoj pli libere parolas pri seksumado kaj pli ofte scias pri ĝi en



la praktiko, ol en Israelo. Ili certe pli ofte fumas haŝiŝon — estas apenaŭ kredeble! **Eble** tri homoj en la sesa klaso ne fumas ĝin — en Israelo **eble** kvin ja fumas ĝin! Oni tute ne uzas pli fortajn drogojn, ekz. heroinon. Necesas atentigi, ke ne ĉiuj britaj lernejoj nepre similas la mian; ni havas iom ne-ordinaran lernejestron. La lernantoj venas de mez-klasaj familioj, do nek riĉaj, nek malriĉaj, sed ĝenerale Britujo estas pli riĉa lando ol Israelo.

Mi ĉeestis feston lasta-tempe en mia lernejo. Oni elspezis multe pli da mono por trinkaĵoj kaj manĝaĵoj ol okazus en Israelo. Tie, ĉe lerneja festo troviĝus nur frukto-trinkaĵoj, sed ĉi tie estis pli fortaj trinkaĵoj kiel vino kaj nur **unu** botelo da kokakolo (por sesdek homoj. . .).

Preskaŭ ne ekzistas intereso pri politiko en mia nuna lernejo. En Israelo multaj lernantoj okupiĝis pri politiko preskaŭ plen-tempe kaj havis tre diversajn opiniojn de dekstro ĝis maldekstro. Tial ofte okazis viglaj malkonsentoj, kiuj eble pli-fortigis la intereson pri politiko. Krome, en Israelo politiko estas ege grava demando por milionoj da homoj — ĝi estas demando pri morto kaj vivo — sed en Britujo ĝi ne tiom rilatas al la ĉiu-taga vivo. Mi rimarkas iom malagrablan senton ĉi tie, ke nenio vere gravas, la gejunuloj jam posedas ĉion, kion ili deziras, ili ne plu havas celon. Mi opinias, ke por pensanta homo, estas pli bone plenkreski en Israelo. Sed mi pli ĝuas la vivon ĉi tie, kie la plen-aĝuloj havas pli aktualajn opiniojn kaj pli volonte akceptas la ideojn kaj konduton de la gejunuloj.

Jonathan Löwenstein

Serĉo de novaj vojoj

NE ESTAS tre originale diri, ke lerni lingvon signifas lerni kvar aspektojn de lingvo-uzado, kiuj estas: legi — skribi — aŭskulti (kompreni) — paroli.

Legi kaj kompreni implicas pasivan konon de la lingvo, paroli kaj skribi aktivan. Sufiĉe multaj homoj kapablas akiri bonan konon pasivan; relative malmultaj sciopovas lingvon aktive.

Kiam ni observas la situacion ĉe la plimulto de la homoj rilate la uzadon de fremdaj lingvoj, ni konstatas ke ili plej ofte bezonas pasivan konon, pli ol aktivan: ni legas kaj aŭskultas multe pli ofte ol ni skribas aŭ parolas fremdan lingvon. Memkompreneble, estas komercaj kaj sciencaj medioj en kiuj aktiva kono estas nepre necesa!

Pasivan konon de lingvo ni preskaŭ neniam forgesas; aktivan, sen daŭra uzado, tre rapide.

Kaj kio okazas en la lernejoj? Pro diversaj motivoj, oni tiom insistas pri la aktiva kono, ke plej ofte la aliajn aspektojn, kvankam tre gravaj por la plimulto de la homoj, oni neglektas kaj eĉ forlasas.

Se vi bone kalkulas, vi konstatas ke en normala klaso ĉiu lernanto apenaŭ povas paroli dum po kelkaj minutoj leciono, du-trifoje semajne! La rezulto estas ke la gelernantoj, malgraŭ multnombraj lecionoj, ne povas paroli, nek legi aŭ skribi. Neŭtralaj observantoj efektive konstatas ĝeneralan malprogreson de la lingva scio, malgraŭ plej modernaj metodoj kaj multekostaj aparatoj...

Ho, mi scias: Esperanto estas vivanta lingvo, do unuavice parola lingvo, kiel la angla, la franca ktp. Sed oni forgesas la realaĵon: kiom da homoj — escepte de kelkaj aktivuloj — vere havas la okazon nuntempe regule paroli la Internacian Lingvon, kompare kun tiuj kiuj ĝin uzas tre ofte por legi kaj skribi?

Multaj plenkreskuloj plendas pri la malrapideco de Esperanto-kursoj, pri la lernejo de la uzataj metodoj. Ĝisfundan pasivan konon ili povus akiri multe pli rapide ol aktivan. La progresoj ne nur estus pli rapidaj, sed tuj videblaj kaj uzeblaj, kaj tiu ĝisfunda pasiva kono permesus, se necese, rapidan aktivigon.

Por instrui la germanan, mi antaŭ multaj jaroj ekde la unua leciono uzis facilan novelon kun interese en-havo. Dum ni progresis, mi klarigis la signifon de la vortoj kaj la gramatikaĵojn, kiujn la studentoj trovis en ilia natura kunteksto. Ili notis ĉion en kajeron kaj konstatis ke multaj vortoj kaj gramatikaĵoj tre regule revenas en la teksto. Ekde la komenco, mi insistis pri plej pura prononcado. Ni ne sisteme faris tempo-rabajn parolekzercojn. La rezultoj, kontrolitaj de in-

Du ĉefaj grupoj de homoj normale legus facilan Esperanto-revuon. Unu, kompreneble, estas komencantoj. La alia, eble malpli evidente, estas instruistoj. Tial ni atentigas ankaŭ iliajn interesojn en ĉi tiu facila numero, per artikolo pri teoria demando (kiu ja, cetere, utiligas ĉiujn rimedojn de la lingvo!).

spektoro, estis bonegaj. Se ni aplikus tiun metodon al Esperanto, la gelernantoj sendube rapidege povus progresi kaj en la jarfino legi ian ajn ne tro malfacilan Esperanto-tekston kaj skribi facilajn leterojn. Tio tute ne signifas, ke oni ne povas iom post iom fari demandojn rilate la enhavon de la teksto, ĉar la studentoj devas kutimiĝi al demandoj, sed tiuj ekzercoj laŭ mi ne estas esencaj.

Mi scias, ke ĉi tiu propono ŝokos kelkajn kolegojn, kiuj taksos min malprogreseculo! Tio ne ĝenas min, ĉar mi nur rigardas la faktojn, ne la belan teorion. Ili nur pripensu kaj observu tion, kio okazas ĉirkaŭ ili, en ilia labormedio, en la socio, kaj eble ili trovos en mia propono tamen ion konsiderindan!

Mi nur konsideras la hodiaŭan situacion, ne tiun, kiam Esperanto estos devige instruata en ĉiuj elementaj lernejoj. Ankaŭ mi scias ke la fincelo de moderna lingvo-lernado estas paroli, sed kiom da homoj eĉ havas la okazon paroli fremdan lingvon? Mi insistas! Ĉi tiu praktika metodo ankaŭ helpus al okazaj geinstruistoj sen profesia trejnado. Ili povas pli facile prepari tekston ol metodologie perfektan tradician lecionon. En la nuna stato de nia movado, en kiu grave mankas



Esperanto-instruisto Audrey Childs-Mee: Sed ĉu ni ĝuste elektas niajn prioritatojn en la instruado de la lingvo?

profesiaj Esperanto-instruistoj, ni devas serĉi adaptitajn metodojn.*

Ne eblas en ĉi tiu limigita artikolo detale priskribi veran metodon nek priparoli la skizitajn ideojn. Mi nur deziras atentigi miajn kolegojn pri la graveco de ĝisfunda pasiva kono de Esperanto... kaj de aliaj modernaj lingvoj. La gelernantoj, precipe la plenkreskuloj, devas rapide konstati progreson kaj ricevi eblecon legi kaj skribi kiel eble plej frue.

Reagoj de legantoj, eĉ koleraĵoj, estas bonvenaj! Ni nepre devas serĉi novajn vojojn, eĉ se tiuj unuavide ŝajnas nemodernaj. Ĉar dum la Universala Kongreso en Antverpeno en 1982 tuta tago estos dediĉata al instruproblemoj, ni ekde nun devas starigi ĝeneralan diskutadon pri la esencaj aspektoj de Esperanto-instruado. Jen do startsignalo!

E. Symoens (elp. simuns)

* Vidu tiurilate la bonegan artikolon de Audrey Childs-Mee en la 17a numero de la revuo *Transoceano*.

Morto sub la arboj

Sherlock Holmes (elp. ŝerlok hoŭmz) laboras por helpi la policon trovi ŝtelistojn, mortigistojn kaj similajn homojn. Li havas mirindan povon rigardi, pensi kaj el-trovi novajn informojn el tio, kion li vidas. Ofte li parolas pri siaj el-trovoj kun sia amiko, d-ro Watson (elp. ŭocn), kiu estas kuracisto (t.e. homo kiu pri-zorgas malsanulojn). Pri Sherlock Holmes skribis sesdek rakontojn la brita verkisto Arthur Conan Doyle (elp. ate konan dojl: 1859-1930).

SHERLOCK Holmes rigardis la korpon de viro, kiu kuŝis flanke de la vojo inter la arboj.

“Kion vi pensas, mia kara Watson?”

“Ŝajnas al mi, ke —”

“Ŝajnas? Mi ne volas scii pri ŝajno! Ŝajno kaŝas la veron. Mi deziras informojn!” Li aŭskultis kun orelo ĉe la koro de la korpo dum iom da tempo, antaŭ ol diri:

“Mi aŭdas nenion. Ĉu vi scias kion mi el-trovis?”

“Mi kredas, ke ne!”

“Estas facile, mia kara Watson! Li ne plu vivas! Estas ekster-ordinare, ke vi, kiu scias tiel multe pri sano, ne rekonis tion!”

“Ĉu vi estas certa?”

“Tiel certa, kiel duoble du estas kvar!”

“La ĉefa afero nun estas scii, kiu faris la —”

“Tute ne! Unue, kiu li estas?”

“Kompreneble! Mi forgesis pri tio!”

“Ni devas trovi lian nomon, liajn interesojn, kaj —”

“— ĉu li havas edzinon kaj familion?”

“— kiu estis la lasta persono, kiu vidis lin, antaŭ ol li —”

“— kaj la kaŭzon de la morto, ĉu ne?”

“Mirinde, mia kara Watson!”

“Kion vi faros nun?”

“Demandojn, kompreneble. Jen al-venas homoj. Aŭskultu kaj vi lernos multon!”

Al-venis knabo kaj knabineto man-en-mane, kun hundo.

“Bonan tagon!” salutis Sherlock Holmes kaj rideto ekfloris sur lia vizaĝo. Li bone sciis, ke rideto povas helpi. Li parolis al la knabo.

“Kiu vi estas?”

“Mi estas Johano. Mi iras hejmen kun mia fratineto post nia muziko-leciono. La hundo povas rekte sidi kaj peti!”

“Forgesu! Tio ne estas grava. Je kioma horo vi komencis la lecionon?”

“Je la dua tridek.”

“Post-tag-meze?”

“Kompreneble post-tag-meze,” inter-diris la knabino. “Vi estas ridinda maljunulo! Ĉu vi kredas, ke ni ludas meze de la nokto?”

“Nur mi faras la demandojn! Inter-tempe bon-volu teni vian buŝon!”

“Ne demandu sen-kaŭze!” ŝi plu diris.

“Vi ŝajnas dolĉa infano!” diris Holmes al ŝi.

“Jes! Mia onklo ofte diras, ke el ĉiuj en la familio, mi estas la plej kara!”

“Kaj plaĉa!” al-donis Watson, sed li ne tiel pensis.

“Ĉu ĉiu-foje vi iras kun via frato por muziki? Jes aŭ ne?” demandis Holmes.

“Jes. Li zorgas pri mi tiel, kiel mi zorgas pri mia hundo. Ĝi havas fortajn dentojn. Plaĉas al ĝi dika viando!”

“Ĉu vi ne povas doni iom da ripozo al via buŝo?” kaj al la knabo Holmes diris:

“Rigardu ĉi tiun viron. Ĉu vi konas lin?”

La geinfanoj ridis large kaj longe.

“Tiu estas onklo Johano. Li estas bonulo!” diris la knabineto.

“Mi havas malfeliĉan novaĵon,” diris Holmes.

“Via kara onklo mortis. Rigardu lin!”

Ankoraŭ unu fojon ili kun-ridis kaj la knabo diris:

“Ne diru malveron!”

Per la dekstra piedo li forte movis sian onklon, kiu plendis kaj ekstaris kun malfacilo.

“Kio okazas?” li demandis.

“Li ordinare tro trinkas vinon,” diris la knabo. “Ni ofte trovas lin ĉi tie.”

“Via vizaĝo estas tre ruĝa!” la knabineto diris al Sherlock Holmes, sed ĉi tiu turnis la kapon por kaŝi la vizaĝon, antaŭ ol diri:

“Mi kredas, ke mi estas malsana!”

“Kial vi ne informis min, Holmes? Via vizaĝo memorigas pri bela sun-sub-iro!”


“Multon vi ne scias, Watson. Ekzemple, ke via malplaĉa vizaĝo similas al la postaĵo de bovino! Ni reiru al la vilaĝo.”

Bertram Potts


La telefono post 100 jaroj

Satelit-antenoj en Burum, Nederlando. Unu anteno ligas Nederlandon (kaj kelkajn aliajn eŭropajn landojn) kun Ameriko kaj Afriko. La alia ligas kun Azio kaj Aŭstralio. La antenoj sendas interparolojn al satelito kaj ricevas de ĝi la respondojn.

(Fotoj: PTT, NL)



En la 19a jar-cento oni devis fari telefonajn ligojn per-mane. Sed nun tio okazas sen homa helpo. Nun oni ankaŭ povas telefoni al veturiloj kaj ŝipoj. Pli frue oni ne povis telefone paroli al alia lando, ĉar ne eblis aŭdi la paroladon trans centoj da kilometroj. Nun-tempe ankaŭ tio eblas. La telefona parolado povas vojaĝi longan vojon, sed resti tute forta kaj aŭdebla. Oni povas ankaŭ sendi ĝin tra montaro kaj trans marojn per tre altaj konstruaĵoj kaj satelitoj.



Telefon-turo kun pluraj antenoj. Ĉiu anteno povas sendi kelkajn milojn da telefonaj interparoloj al anteno sur alia turo.

EN 1878, en la usona urbo New Haven (elp. nu hejvn), oni ekuzis la unuan telefon-centrejon (= ligejon) de la mondo: loko, kie oni povis ligi ĉiujn telefonojn de la urbo — entute 20. Antaŭ 100 jaroj, en 1881, oni faris la unuajn telefon-centrejojn en ekzemple Francujo, Italujo kaj Nederlando. Post tiam okazis grandaj ŝanĝoj. Nun ekzistas centoj da milionoj da telefonoj en la mondo. Preskaŭ ĉiuj havas (same kiel antaŭ 100 jaroj) dratojn (metal-fadenojn) al centrejo. Sed nun ekzistas ankaŭ telefonoj en aŭtomobiloj kaj ŝipoj, kiuj havas ligan al centrejo per radio.

Antaŭ 100 jaroj, en la centrejo, telefonisto devis per-mane ligi la dratojn de unu telefono al tiuj de alia. Nun, preskaŭ ĉie, almenaŭ por enurbaj interparoloj, ekzistas aŭtomataj centrejoj, kie maŝinoj faras la ligan sen helpo de homoj. Eĉ ekzistas aŭtomataj centrejoj por ligoj kun telefonoj en aŭtomobiloj kaj ŝipoj.

Tiam, oni ne povis telefoni al malproksimaj lokoj, ĉar ne eblis pli-fortigi la interparolon. Nun, oni povas telefoni al preskaŭ ĉiuj landoj de la mondo. Ofte oni bezonas helpon de telefonisto, sed inter kelk-dek landoj oni povas telefoni sen telefonista helpo, aŭtomate do. Por tiaj malproksimaj interparoloj, oni devas mult-foje pli-fortigi. Ekzistas kelkaj manieroj por tio. Oni povas, ekzemple, uzi kvar dratojn: du por unu direkto (tien), du por la alia direkto (reen). Por ambaŭ direktoj oni metas pli-fortigilojn. Per tiaj kvar dratoj, tamen, oni ne sendas nur unu interparolon. Ĉar altaj sonoj ne necesas por bona kompreno, oni fortranĉas ilin. Poste oni povas meti, kvazaŭ, unu interparolon sur alian. Tiu-maniere oni povas sendi, ekzemple, 120 interparolojn per la samaj kvar dratoj, sam-tempe. La maŝinoj en la centrejoj feliĉe, plej ofte, sendas la ĝustan interparolon al la ĝustaj telefonoj. Kutime, oni metas la dratojn en kablون (oni faras kablون el, ekzemple, 48 dratoj).


Sed ne ĉiam oni povas facile meti kablojn: ne en montaro, trans riverojn, kaj tiel plu. Kaj la metalo, el kiu oni faras la dratojn, estas multe-kosta. Tial oni nun uzas ankaŭ telefon-turojn (vidu la foton): inter du altaj turoj, oni sendas la interparolojn per radio, per tre mallongaj ondoj. Tio eblas, se de la supro de unu turo oni povas vidi la supron de la alia. Tiel, inter du turoj povas esti 40 aŭ 50 kilometroj (inter montoj, pli). Sed, maroj estas pli largaj. Do, kiel oni faras telefonan ligon trans marojn? Oni povas sendi (mal-multajn) interparolojn per long-onda aŭ mallong-onda radio. Oni ankaŭ povas meti kablon subakvan. La unuan telefon-kablon inter Eŭropo kaj Norda Ameriko oni metis en 1956. En la maroj nun kuŝas multaj tiaj kabloj, kaj oni daŭre metas pliajn. Sed oni ankaŭ povus pensi pri tre alta turo — tiel alta, ke de ĝia supro oni povus vidi je unu flanko Usonon kaj je la alia flanko Eŭropon, ekzemple. Tian turon oni ne povas

fari (ĝi devus esti centojn da kilometroj alta), sed ĝian supron oni faras: sateliton. (Unua “sen-mova” satelito por telefonado: 1965). Tia satelito kostas eĉ multe malpli ol submara kablo (por same multe da interparoloj inter ekzemple Eŭropo kaj Usono), sed kablo havas pli longan vivon. Kaj por satelitoj oni bezonas tre multe-kostajn antenojn. Tial oni nun faras kaj satelitojn kaj sub-marajn kablojn.

Per multaj centrejoj, per kabloj, telefon-turoj kaj satelitoj, oni nun povas telefoni al la alia flanko de la mondo. Eĉ sen la helpo de telefonisto. En Japanujo, ekzemple, vi turnu (aŭ premu) “nur” la ciferojn. . . 00131320026514, kaj la maŝinoj en la centrejoj preskaŭ tuj ligos vin kun nederlanda telefono. Sed, ĉu tio multe signifas, se oni povas kompreni eĉ ne vorton de la lingvo de la homo, kiu estas je la alia flanko?

Wouter F. Pilger (elp. vaŭter pilĥer)

Kiel ne-aŭdanto povas uzi telefonon



Per la maŝino dekstre, ankaŭ ne-aŭdanto povas uzi telefonon. En 1983 oni uzos skrib-telefonojn, kiuj povas montri pli da vortoj.

Surduloj estas homoj kiuj ne povas aŭdi. Ili do ne povas uzi ordinaran telefonon. En kelkaj landoj, surduloj povas ricevi ilon kiu similas al skrib-maŝino (vidu la bildon). Tiun maŝinon oni ligas al la telefono. Se oni volas telefoni al tia homo, kaj se oni mem ne havas tian skrib-telefonon, oni telefonas al oficejo, kie la oficisto sendas la informon al la skrib-telefono de la surdulo. La surdulo tiam povas respondi per sia skrib-telefono al tiu oficejo. La oficisto legas tiun respondon al la homo kiu telefonas.

EN MULTAJ LANDOJ, la surduloj lernas paroli. En tiuj landoj, do, surduloj povus mem respondi per sia voĉo. Tie oni povas uzi la manieron, kiun (prove) komencas uzi la Nederlanda Poŝto kaj Telefono. Nun-tempe ekzistas multaj telefonoj kun prem-butonoj. Sur tiaj telefonoj estas dek butonoj por la

ciferoj kaj du pliaj butonoj. Ni nomu ilin ‘+’ kaj ‘-’. La surdulo ricevas maŝinon, kiu povas montri literojn kaj ciferojn. La homoj, kiuj volas telefoni al surduloj, ricevas paperetojn por fiksi sur la butonojn de sia telefono, kaj paperon kun truoj. Ili povas meti tiun paperon sur ĉiun prem-butan telefonon. Sur tiuj paperoj staras literoj apud ĉiu cifero. Ekzemple, apud ‘1’ oni vidas la literojn A, B kaj C. Se oni telefonas al surdulo, li aŭ ŝi vidas sur sia maŝino, ekzemple, la literon A se oni premas +1, B se oni premas 1, C se oni premas -1 kaj 1 se oni premas + -1.

En tiu maniero, oni povas telefoni al surdulo de ĉiu telefono, ankaŭ surstrate en la urbo, se nur la telefono havas prem-butonojn. La surdulo povas legi la vortojn kaj li aŭ ŝi povas respondi per sia voĉo. La homo, kiu telefonas, ne bezonas havi skrib-telefonon, kaj oni ne bezonas peti la helpon de telefonaj oficistoj.

Wouter F. Pilger

Asocio por intelligentuloj

MENSA INTERNACIA estas asocio de homoj kun tre diversaj interesoj, opinioj kaj kapabloj. Por esti membro de la asocio oni devas sukcesi ĉe ekzameno pri inteligenteco. Tiu ekzameno celas mezuri ne la atingojn sed la naturajn kapablojn de la homoj. Ĉiuj, kies ekzamen-rezulto kontentigas la postulojn de la asocio rajtas fariĝi membroj de Mensa.

La asocio ekestis en oktobro 1946 en Oxford (oksf), Britio, kaj dum dek kvar jaroj restis nur brita asocio. En 1960 oni starigis Mensa-grupon en Usono, kaj Mensa estis ne plu nur nacia asocio, sed internacia organizaĵo. Baldaŭ naskiĝis Mensa-grupoj en pluraj aliaj landoj, kaj hodiaŭ la asocio havas pli ol 55 000 membrojn en 87 landoj.

Mensa estas vorto el la latina lingvo, en kiu ĝi havas signifon "tablo". Ĝi estas trafa nomo por la asocio, ĉar neniuj el ĝiaj membroj estas super la aliaj, kvazaŭ ili sidus ĉirkaŭ ronda tavolo.

Por kio utilas ĉi tiu internacia asocio de alt-intelligentuloj? Unue ĝi faras agrablan servon al siaj membroj, ĉar ĝi kunligas intelligentulojn kaj faciligas al ili mond-vastan interŝanĝon de ideoj kaj opinioj. Due ĝi kuraĝigas sciencajn esplorojn, kiuj helpas al la homoj ĝenerale pli bone vivi. Trie ĝi agas por eltrovi, subteni kaj utiligi la homan inteligentecon por la bono de la tuta homaro. La organizaĵo estas neŭtrala rilate al politiko, religio kaj nacieco. Ankaŭ rilate al lingvoj ĝi montras neniun antaŭjuĝon. En la praktiko, tamen, ĝi uzas ĉefe la anglan kiel internacian lingvon, kaj la francan

kaj germanan laŭ bezono. Membroj ricevas la internacian monatan revuon en unu el tiuj tri lingvoj, laŭ elekto.

La naciaj asocioj organizas ĉiu-jare semajn-finajn jar-kunvenojn. Okazas, krom la afer-kunsidoj kaj festaj aranĝoj, interesaj paroladoj faritaj de fakaj spertuloj. Ĉiu-monate okazas mirige diversaj Mensa-kunvenoj, festaj kaj seriozaj, en la diversaj landoj, kie troviĝas Mensa-membroj. La asocio aranĝas ankaŭ seriozajn kongresojn kaj stud-kunvenojn.

Krom la internaciaj kaj naciaj revuoj, regule aperas la informiloj de la multaj fakaj asocioj de Mensa. La interesoj de tiuj fak-grupoj estas tiel diversaj kiel la membroj de Mensa mem, interalie: literaturo, poŝt-mark-kolektado, vino-farado, lingvoj, scienc-esplorado, pli naturaj viv-manieroj, ludoj, natur-konservado, militado, vojaĝado, homaj rajtoj kaj, kompreneble, Esperanto. Pluraj grupoj okupas sin pri la problemoj de la super-dotitaj – (tio estas, la aparte intelligentaj) – infanoj, kaj aliaj pri la malplej-dotitaj infanoj.

Ĉar Mensa Internacia ne havas lingvo-politikon, ĝi ne, kiel asocio, subtenas la internacian lingvon, Esperanto, nek kontraŭstaras ĝin. La Internacia Komitato scias, ke, kvankam la membraro de Mensa daŭre kreskas, la asocio plej progresas en angla-lingvaj landoj kaj kulturoj. Tial ĝi serioze serĉas manierojn interesi ankaŭ homojn de aliaj landoj kaj kulturoj. Lasta-tempe la Esperanta fak-grupo, Espermenso, verkis Esperant-lingvajn informojn pri la asocio por helpi la progreson de Mensa ankaŭ en ne-angla-lingvaj kampoj.

Legantoj kiuj ŝatus havi pli da informoj pri la asocio povas skribi al: Internacia Oficejo de Mensa, Bond House, St John's Square, Wolverhampton, Britio, WV2 4AH.

Bonvolu skribi en Esperanto kaj klarigi, ke vi legis pri Mensa Internacia en la revuo *Esperanto*.

Audrey C.E. Childs-Mee (elp. odri ĉajldz-mi)

Enigmo

Faru vortojn el la jenaj silaboj por respondi la naŭ demandojn.

AŬ - BA - BLO - BRO - DO - DU - E - EK - KA - KON - KU - LOJ - NO - NO - NO - O - PER - RA - SA - SO - TA - TAS - TO - TO - TU - VEM - ZIS

1. Legu la demandojn apude.
2. Rigardu la silabojn.
3. Faru naŭ vortojn el la silaboj por respondi la demandojn. (Vidu la ekzemplon 1.)
4. En la fino, skribu la unuan literon de ĉiu respondo (ekz. la literon E de respondo 1) por formi novan vorton.

1. Estas	<u>EK</u>	<u>ZIS</u>	<u>TAS</u>
2. Tago de la semajno	_____	_____	_____
3. Homo	_____	_____	_____
4. Instruado	_____	_____	_____
5. Historio	_____	_____	_____
6. Sezono (parto de la jaro)	_____	_____	_____
7. Monato	_____	_____	_____
8. Meblo	_____	_____	_____
9. Partoj de la vizaĝo	_____	_____	_____
Fina respondo:	<u>E</u>	<u> </u>	<u> </u>
	1	2	3
	4	5	6
	7	8	9

Irma Kocher
(por la respondoj, vidu la paĝon 200)



Estis riĉulo kun grandegaj havaĵoj. Li havis mil ujojn da rizo en sia riz-tenejo. Li tre amis sian filon, kiu havis tre malgrandajn sciojn.

Ejcz diris al la riĉulo: "Via filo estas tute ne-utilla. Kiam vi estos morta, kiel li povos pri-zorgi vian riĉaĵon? La riĉulo respondis: "Kial ne? Li scias sufiĉe."

"Se vi ne kredas al mi," diris Ejcz, "permesu, ke mi montru tion al vi. Sufiĉas nur demandi: 'De kie venas la rizo?'"

Oni vokis la knabon kaj demandis tion al li. Li ridetis: "Ĉu vi ne scias tion? La rizo devenas el la ujoj en la riz-tenejo."

Ilus. Suhŭa

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,85 guldenon (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj mem, kiuj bonvolu memori, ke rabaton por sinsekvaj ripetoj ni donas nur al enkadrigitaj anoncoj, kiel tiuj sur la kontraŭa paĝo, sed ne al anoncetoj.

Yvette Vierende el Montpellier falis kaj rompis sian femuroston. Ŝi estas en kuracejo 260km for de sia urbo, dum 4-6 monatoj. Kun plezuro ŝi ricevos poŝtkartojn de geamikoj. Adreso: Centre de Rééducation, Thuès-les-Bains, F-66360 Olette, Francujo.

Komencantoj! TEJO proponas al vi libron *Tridek roluloj*. 5 simplaj amuzaj skeĉoj kun ekzercoj. Ilus. 72-paĝa. 8,10 gld. ĉe la libroservo de UEA, triona rabato por 3 aŭ pli.

Pasporta Servo de TEJO. Gastigantoj bezonataj por 1982. Skribu al: J.M. Cash, 5, allées des Félibres, F-31520 Ramonville-St. Agne, Francujo.

Studi matene, ferii posttagmeze, jen la kursformulo de la Internacia FERIA Altlernejo de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando). Petu informilon!

Se Esperanto interesas vin ankaŭ kiel kul'ura lingvo, aliĝu al Internacia Ligo de la Esperantistoj-Filologoj. Kontraŭ 6,25 gld. vi ricevas ankaŭ la gazeton *Filologo*; eblas pagi al peranto per UEA-konto 5613 aŭ poŝtgironto 1156545, nome de R. Moerbeek, Rotterdam, Nederlando, indikante la jaro(j)n por kiu(j) vi pagas.

Gemembroj de la Demokrata Junulara Asocio serĉas amikajn kontaktojn kun geesperantistoj el la tuta mondo. Adreso: Związek Młodzieży Demokratycznej, Esperanta sekcio, ul. Reja 6, Ziel. Gora, Pol.

Nova esperantistino, filologo, en Bulgarujo, deziras korespondi kun nederlandanoj pri nuntempa literatura vivo en Nederlando. Stefka Ivanova Pojarkova, ul. Ĥristo Botev 28, vh. B, et. 4, ap. 12, Stara Zagora, Bulgarujo.


Ĉe-metode instruadu ankaŭ vi, private aŭ lerneje, laŭ: *Esperanto laŭ la patrina metodo*, 320 paĝoj, GM 50,00! 50-instruhora kabareto lernigas esperante kaj germane ĉiujn demandojn kaj respondojn de la ĉiutaga konversacio! August Weide, Nordalbinerweg 65, D-2000 Hamburg 61, poŝtgironto Hamburg 150 58-209.

Esperanto en praktiko: Volontuloj serĉataj de Hans Kästli, infanhejmo por handikapitoj, Sonnenheim, CH-9424 Rheineck, Svislando.

Pentrismo deziras interŝanĝi oleopentraĵojn (pejzaĝoj), dum la venonta Universala Kongreso en Antverpeno. Interesotaj tuj kontaktu: Fredo Bosmans, 21, route de Comblain, B-4183 Ferrières, Belg.

14-jara knabo deziras korespondi en Esperanto pri geografio, historio, sporto. Andreo Michalski, ul. Raszewska 7/8, PL-63-400 Ostrów Wlkp, Pollando.

Ĉina medicina laboristo, 31-jara, deziras interŝanĝi poŝtkartojn. Chen Youdao, Nerve Section, Hospital attached to Guiyang Medical College, 550001, Ĉina PR.



ĈIU-TAGE

05.00-05.30 Varsovio, 200m (1503 kHz), 75.85m (3955 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz), 41.27m (7270 kHz). I.P. Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00950 Warszawa, Pollando.

11.00-11.30 Pekino, 30.42m (9860 kHz), 19.34m (15510 kHz). I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Popola Respubliko Ĉinio.

13.00-13.30 Pekino, 25.67m (11685 kHz), 19.81m (15145 kHz). I.

15.30-16.00 Varsovio, 48.90m (6135 kHz), 31.45m (9540 kHz). I.P.

20.00-20.30 Pekino, 32.00m (9365 kHz), 30.10m (9965 kHz), 26.21m (11445 kHz). I.

21.30-22.00 Varsovio, 200m (1503 kHz), 75.85m (3955 kHz), 50.04m (5995 kHz), 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz). I.P.

22.30-23.00 Pekino, 26.05m (11515 kHz), 19.78m (15165 kHz). I.

DIMANĈE

05.45-05.57 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 24.97m (12015 kHz), 16.89m (17765 kHz). I.P. ORF, Esperanto, A-1136 Wien, Aŭstrio. Ripeto de la antaŭa sabata programo.

20.05-20.15 Vatikano, 196m (1530 kHz), 48.30m (6210 kHz), 41.38m (7250 kHz), 31.17m (9625 kHz).

Ne sufiĉas nur aŭskulti radioelsendojn en Esperanto! Vi devas ankaŭ foje skribi al la redaktoj. Radio-redaktistoj ne povas kalkuli siajn aŭskultantojn. Nur per viaj leteroj ili scios, kiom da homoj utiligas kaj deziras daŭre ricevi elsendojn en la Internacia Lingvo.

Ĉiujn informojn pri radio bv. sendi al s-ro G. Larglantier (redaktisto de ĉi tiu paĝo), ĉe 29, Bd. Murat, F-75016 Paris, Francio. Ĉi-sube estas la horoj de radio-elsendoj laŭ Grenviĉa Meza Tempo (G.M.T.).

Mallongigoj: I = informoj, P = parolado, K = kurso.

31.10m (9645 kHz), 25.64m (11700 kHz), 19.84m (15120 kHz). I.P.

Radiovaticana, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italio.

23.00-23.15 Rio de Janeiro, 214m (1400 kHz). P. Brazila Spiritisma Federacio, av. Passos 30, BR-20000 Rio de Janeiro ZC 58, Brazilo.

LUNDE

00.00-01.00 Sorocaba, 278m (1080 kHz). I.K. Rádio Clube de Sorocaba, Esperanto-redakcio, rua da Penha 455, BR-18100 Sorocaba (SP), Brazilo.

18.00-18.10 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66 (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz). P. Svisa Radio Internacia, Esperanto-fako, CH-3000 Bern 15, Svislando.

20.30-20.40 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66 (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz). P.

MARDE

17.55-18.00 Vieno, 89.8 MHz (mod. frekv.). I. ORF, Esperanto, Postfach 700, A-1041 Wien, Aŭstrio.

22.45-23.00 Zagrebo, 262m (1143 kHz). P. Radio Zagreb, Esperanto-fako, Zagreb, Jugoslavio.

MERKREDE

21.30-21.45 Sabadell, 187m (1602 kHz). I.K. Radio EAJ 20, Esperanto-fako, C. Convento 22, Sabadell, Hispanio.

ĴAŬDE

06.10-06.25 Vatikano, 196m (1530 kHz), 48.30m (6210 kHz), 41.38m (7250 kHz), 31.17m (9625 kHz), 31.10m (9645 kHz), 25.61m (11715 kHz), 25.55m (11740 kHz), 19.84m (15120 kHz), kaj M.F. 93.0 MHz, 96.5 MHz. I.P.

18.00-18.10 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

20.30-20.40 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

SABATE

16.45-16.57 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 30.71m (9770 kHz), 19.74m (15200 kHz). I.P.

18.00-18.10 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

20.00-20.20 Romo, 41.24m (7275 kHz), 30.90m (9710 kHz), 25.42m (11800 kHz). P. Radio Roma, Esperanto, C.P. 320, I-00100 Roma Centro Corr., Italio.

20.30-20.40 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

20.30-20.45 Valencio, 358m (836 kHz). P. La Voz de Valencia, av. del Cid 154, Valencia 14, Hispanio.

ĜENERALA AŬDEBLECO

Tre multe da daŭraj aŭ ne-daŭraj aferoj povas helpi aŭ malhelpi la dissendadon de radiaj ondoj: vetero, sezono, parto de la tago, ĉirkaŭaĵo de la aŭskultanto, speco de ricevilo ktp. Tial ne eblas certigi, ĉu oni sukcesos klare ricevi elsendon en sia lando aŭ mondo-parto. Jen tamen kelkaj ĝeneralaj informoj:

a) Direktitaj ondoj. **Pekino**: 9860 kaj 15510 kHz al Japanio kaj Koreo; 11685 kaj 15145 kHz al Sudorienta Azio; 9365, 9965 kaj 11445 kHz al Eŭropo; 11515 kaj 15165 kHz al Centra kaj Suda Ameriko. **Vatikano**: 9625, 11700 kaj 15120 kHz al Afriko; 6210, 9645, 11740 kHz al Ameriko; **Vieno**: 15260 kHz al Nordorienta Ameriko; 15560 kHz al Proksima Oriento; 21575 kHz al Aŭstralio kaj Azio.

b) Nedirektitaj ondoj kapteblaj long-distance: ondoj ne listigitaj ĉi-supre sub a) el **Berno, Romo, Varsovio, Vatikano, Vieno, Zagrebo**.

c) Nur loka aŭskultebleco por **Rio de Janeiro, Sabadell, Sorocaba, Valencio** kaj ĉiuj disaŭdigoj per modulita frekvenco (M.F.).

RESPONDO

al la enigmo sur paĝo 198

- | | |
|---------------|---------------|
| 1. Ek zis tas | 6. Aŭ tu no |
| 2. Sa ba to | 7. No vem bro |
| 3. Per so no | 8. Ta blo |
| 4. E du ka do | 9. O ku loj |
| 5. Ra kon to | |

“La revuon MONATO oni senhonte povas montri al ĉiu ajn homo!” — Unu el la multaj entuziasmaj eldiroj pri la propaganda valoro de unika revuo por unika lingvo. Per MONATO vi pli facile povas konvinki homojn pri la valoro kaj utilo de la Internacia Lingvo. Tial MONATO manku en neniuj ekspozicioj, varb-vespero, urba kaj universitata biblioteko, E-kurso.

Se ankaŭ vi volas konvinki homojn pri la valoro kaj utilo de Esperanto, petu varb-materialon ĉe: Eldonejo TK/Stafeto, Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat, Belgio.

MONATO

internacia magazino sendependa

40 paĝoj DIN A4, riĉe ilustrita. Dek unu kajeroj plus poŝkalendaro jare. Jarabono 59,50 gmk aŭ 960 bfr. La abonon bonvolu sendi rekte al la eldonejo: TK/Stafeto p.v.b.a., Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat, Belgio — aŭ mendu ĉe landa peranto aŭ UEA (64,00 gld.; por Nederlando 66,56 gld.). Petu provekzempleron kontraŭ du int. respondkuponoj. (Tamen memoru, ke unu persono povas nur unufoje fari tian peton.)



BONA INFORMO 20% DA RABATO

La abonvarba kampanjo de *El Popola Ĉinio* por 1982 jam komenciĝis. Ekde la 1-a de novembro 1981 ĝis la 28a de februaro 1982 estas ĝia periodo kaj dume farante abonon al la gazeto oni povas profiti 20% da rabato el la abontarifo. Ne perdu la ŝancon, tuj abonu kaj varbe abonigu viajn parencojn kaj amikojn! Kiel abonvarbanto vi povos ricevi el Ĉinio rekompencojn. Se vi unufoje sukcesis varbi 4 abonantojn vi do povos ricevi unu pecon de “libro-kupono” kiel donacon. La kupono valoras US\$5.00 por peco.

Abontarifo:

(abonperiodo)	(la aktuala prezo)		
1 jaro (12 n-roj)	£3.00	US\$ 6.00	Gld. 12,60
2 jaroj (24 n-roj)	£5.00	US\$10.00	Gld. 21,00
3 jaroj (36 n-roj)	£7.50	US\$15.00	Gld. 31,50

Abonu ĉe: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando (poŝtĉekkonto 37 89 64). **Nederlandaj klientoj** bonvolu aldoni 4% por la enlanda imposto. Abonebla ankaŭ rekte ĉe la Esperanta Sekcio de GUOJI SHUDIAN (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.

Petu prospektojn kaj specimenojn de Guoji Shudian!

HEROLDO

DE ESPERANTO

LA PLEJ OFTA INTERNACIA GAZETO DE LA ESPERANTO-MOVADO
De 61 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- 17 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Junulara, instruista, literatura rubrikoj, librorecenzoj, listo de fakaj artikoloj en Esperanto
- Duobla Kongresa numero, kalendaro de internaciaj renkontiĝoj kaj kongresoj
- Libera Tribuno de la legantoj, anoncetoj, ŝak-problemoj, krucvortenigmoj, foto-filmo
- Sciencaj suplementoj, ktp.

Jarabono: 16,00 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro.

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA (33,00 guldenoj; por Nederlando 34,32 gld.)

Mendu provnumeron ĉe la redakcio: Calle de Juan Ramón Jiménez n-ro 28, 6° A, Madrid 16, Hispanujo
Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska

IAM KOMPLETIGOTA PLENA VERKARO DE L.L. ZAMENHOF

FELIĈE JAM APERIS:

1 unuaj libroj por esperantistoj

1887~1888

1^{bis} la inkunabloj de esperanto

1887~1889

2 ni laboru kaj esperu!

1887~1891

3 antaŭen al la laboro!

1892~1895

4 tamen la afero progresas!

1896~1900

5 hebreo el la geto

1859~1901

6 kun gradaj paŝoj eksterlanden!

1901~1904

7 klopodis organizi, sed vane!

1905~1906

8 por kaj kontraŭ reformoj!

1907~1908

9 mortinta, sed senmorta!

1909~1917

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA! Unuopa volumo: 36,00 gld.

Kiom el niaj revuoj aperigis la septembran numeron jam en julio? Almenaŭ unu:



kiu per sia unua jarkolekto (oktobro 1980 – septembro 1981) firme establiĝis kiel la beletra revuo de la okdekaj jaroj.

Redaktoro: William Auld. Aperas ĉiumonate: 12 ilustritaj kajeroj, po 44p., jare.

Enhavo de la unua jarkolekto: 40 originalaj noveloj, 29 tradukitaj noveloj (el 9 lingvoj), 108 originalaj poemoj, 143 tradukitaj poemoj (el 25 lingvoj), 2 teatraĵetoj kaj 3 longaj recenzoj.

Ankoraŭ haveblas la unua jarkolekto kontraŭ 35,00 gld. Abonojn por la 2a jarkolekto akceptas la Libroservo de UEA. Prezo: 39,00 gld. (plus 4%, nur por nederlandaj klientoj).



Eldonisto:

Gersi Alfredo Bays

Caixa Postal 49

BR-89800 Chapecó (SC)
Brazilo



LA KRABO KUN RAJ PINĈILOJ

LA UNUA AVENTURO DE TINĈJO FINE APERIS! MENDU TUJ ĈE VIA KUTIMA LIBROSERVO AŬ ĈE: Tutmonde: UEA (13,20 NLG) kaj SAT (26 FRF). Belgio: (160 BEF) Esperanta Brusela Grupo, Eldonejo-Librejo Sonorilo, Eldonejo TK/Stafeto, Flandra Esperanto-Ligo. Francio: (26 FRF) Kulturdomo Grésillon, SAT-Amikaro, Henri Masson, Patrick Kruissel, Groupe d'Action pour l'Espéranto, Libroservo Tomblaine, Unuiĝo Franca por Esperanto. Grand-Britio: Language Services. Hispanio: Hispana Esperanto-Federacio. Japanio: Japana Esperanto-Instituto. Luksemburgo: Esperanto-Centro.

SE NEHAVEBLA, MENDU REKTE ĈE LA EKSKLUZIVA DISVENDISTO:

Por 1 – 9 ekz. po 26 FRF, plus 5 FRF por afranko. Ekde 10 ekz. rabato 25%, ekde 100 ekz. rabato 33,33%, plus 10% sendokostoj.

★ **ESPERANTIX**®

LIBRE-RÉPONSE 8538-75S

75742 PARIS CEDEX 15

Telegramadreso: ESPERANTO Paris

Telezo: 250 303 Paris public ESPERANTO

☎ (1) 558 4112 - Pck. PARIS 2 007.47 J